

ESPERANTISTA

REVUO POR ESPERANTO EN ĈEĤOSLOVAKIO

Eldonas Esperanto-Asocio en ĈSR, Praha II, Malá Štěpánská 7. – Redaktas Dr. Stan. Kamarýt

Kelkaj konceptoj de J. V. Stalin pri universala tutmonda lingvo

(Fragmentoj el pli ampleksaj traktaĵoj.)

Jam en jaro 1912 en sia klasika verko »Marksismo kaj la nacieca problemoj«, J. V. Stalin konsideris lingvon unu el plej gravaj karakterizaĵoj de nacia ekzistado kaj ankaŭ pli poste li kontraŭstaris pseŭdomarksismajn ideojn, postulantajn en periodo de socialismo likvidon de la naciaj lingvoj kaj enkondukon de unusola universala mondlingvo.

En j. 1925 en la Universitato de Orientaj Nacioj, polemikante kun Kautský, Stalin diris: »Oni diras (ekz. Kautský asertas), ke en la periodo de socialismo ekestos unusola tuthoma lingvo kaj ke ĉiuj ceteraj lingvoj formortos. Mi malmulte kredas fiun ĉi teorion de unusola universala lingvo. La spertoj ne parolas por tiu ĉi teorio, sed kontraŭ ĝi. Ĝis nun estis tiel, ke socialisma revolucio ne malpliigis, sed pligrandigis la nombron de lingvoj, ĉar vekante plej vastajn masojn de la homaro kaj elportante ilin sur la politikan scenejon, ĝi vekas por politika vivo tutan vicon da novaj nacioj antaŭe nekonataj aŭ malmulte konataj.«

En la fama verko »La Nacieca Problemo kaj Leninismo« el jaro 1929 ni povas legi pri la problemoj de universala lingvo jenajn eldirojn de Stalin:

... Vi faras gravan eraron, farante egaligon inter la periodo de venko de socialismo en unu lando kaj inter la periodo de venko de socialismo en tutmonda skalo, asertante, ke ne nur dum venko de socialismo en tutmonda skalo, sed ankaŭ dum venko de socialismo en unu lando povas kaj devas malaperadi la naciaj lingvoj, ke la nacioj kunfandiĝas kaj unusola komuna lingvo formiĝas. Vi intermiksas ĉi tie tute diferencajn aferojn: »forigon de la nacieca subpremado« kun »likvido de naciaj malsamaĵoj«, »forigon de naciecaj ŝtataj baraĵoj« kun »formortado de nacioj«, kun »kunfandiĝo de nacioj...«

... Estus erare konjekti, ke la unua fazo de periodo de proletara diktaturo en tuta mondo estos komenco de formortado de nacioj kaj naciaj lingvoj, komenco de formiĝo de unu komuna lingvo. Male, la unua fazo, dum kiu estos definitive forigita la nacieca subpremo, estos fazo de kresko kaj de disfloro por la ĝistiam subpremataj nacioj kaj naciaj lingvoj, fazo de firmiĝo de egalrajteco de nacioj, de forigo de reciproka malfido inter la nacioj.

Nur en la dua fazo de la proletdiktatura periodo tutmonda, sammezure kiel kreiĝados unueca tutmonda socialisma ekonomio, anstataŭ tutmonda ekonomio kapitalisma, nur en tiu ĉi fazo komencos kreiĝi io kvazaŭ komuna lingvo, ĉar nur en tiu ĉi fazo eksentos la nacioj

neceson havi krom siaj naciaj lingvoj unu komunan internacian lingvon — por faciligo de rilatoj kaj por faciligo de ekonomia, kultura kaj politika kunlaborado. Eblas, ke en tiu fazo la naciaj lingvoj kaj la komuna internacia lingvo ekzistos paralele. Eble ke komence ne estos kreita unu komuna tutmonda ekonomia centro por ĉiuj nacioj kun unu komuna lingvo, sed ke ekestos kelkaj zonaj ekonomiaj centroj por unuopaj nacigrupoj kun aparta komuna lingvo por ĉiu nacia grupo kaj ke nur pli poste tiuj ĉi centroj kuniĝos en unu komuna centro de socialisma ekonomio kun unu komuna lingvo por ĉiuj nacioj.

En la plua fazo de la tutmonda proletara diktaturo, kiam la tutmonda socialisma ekonomia sistemo sufiĉe firmiĝos kaj la socialismo fariĝos vivmaniero de ĉiuj homoj, ke la nacioj praktike konvinkiĝos pri la avantaĝoj de komuna lingvo antaŭ la lingvoj naciaj — komencos formortadi naciaj diferencaĵoj kaj lingvoj kaj komencos cedaĵi lokon al tutmonda lingvo komuna al ĉiuj...

El artikolo de B. Serebrennikov, presita la 29. aŭg. 1950 en Komsomolskaja Pravda sub titolo »Kial popoloj de l'mondo parolas diversajn lingvojn« ni citu la lastajn alineojn:

... Estas sendube, ke komunista socio uzados foje unusolan lingvon por la tuthomaro. Tio ja estos atingita nur post longa evoluo. La unua periodo de la tutmonda proleta diktaturo, dum kiu estos definitive likvidita nacieca subpremado, estos sub signo de kresko kaj disfloro de antaŭe subpremataj nacioj kaj ties lingvoj. Nur en la dua etapo, kiam firmiĝos tutmonda socialisma ekonomio, komencos naskiĝi komuna lingvo. Diversaj nacioj tiam eksentos bezonon havi komunan lingvon. En tiu periodo apud la naciaj lingvoj ekzistos ankaŭ lingvo internacia.

Estas eble — emfazis J. V. Stalin — ke komence ne ekestos komuna lingvo por la tuta mondo, sed estiĝos sinsekve komunaj lingvoj por grandaj mondaj ekonomiaj centroj kaj ke nur en la lasta etapo realiĝos kreo de komuna lingvo por ĉiuj ĉi centroj.

Kiam la socialisma organizado ekregos la tutan terglobon kaj kiam ĉiuj nacioj konvinkiĝos pri la avantaĝoj de komuna lingvo antaŭ la naciaj lingvoj, la naciaj lingvoj komencos formortadi kaj cedos fine tute al unueca komuna lingvo de l'homaro. Tiu ĉi lingvo estos nek la germana, nek la rusa, la angla, sed nova lingvo, enhavanta plej bonajn elementojn de la naciaj kaj regionaj lingvoj.

Tradukis Jiří Kořínek.

Překlady Zamenhofových básní od Miloše Lukáše

Tradukoj de Zamenhof-poemoj Al la fratoj, Mia penso, Ho mia kor' de Miloš Lukáš

BRATŘÍM

Pevně, ó bratří, chtějme vždy státi,
prodchnuti posvátnou snahou;
bojujme, jsouce vespolek spjati
jedinou nadějí blahou!

Temnota čirá doposud je tu,
lidstvo se ve spánek hřízí,
věčně však slunko zazáří světu,
již se nám chvíle ta blíží!

Buďte, ach, buďte ospalou chasu,
ať se kdo směje či mrzí,
volejte, křičte, nešetřte hlasu,
aby jen procitli brzy!

Nedbejte smíchu, burcujte dále;
desetkrát bude to marné,
po jedenácté přece snad ale
vzejde vám ovoce zdárné.

Navzájem jsme si nepřiliš známi,
každý z nás opodál stojí;
kdepak to dlíte, co je to s vámi,
mlení bratří vy moji?

Jedno, zda město skýtá vám sídla,
městys či vesnička malá —
odvaha jako bublina z mýdla
u vás už za své snad vzala?

Třímáte doma úspěšně vesla
sloužice myšlenky naší —
nebo snad ve vás naděje klesla,
že jste tak zamkli, plaší?

Odměnu hojnou, vrcholně blahou
v nitru si budeme nésti:
že jsme svou věrnou, nezlomnou snahou
všelidské stvořili štěstí!

Plňte vesměs úkoly dané
rádně a v důvěře spasné,
v srdci vám oheň nadšení plane,
aniž kdy slábne či hasne?

V postoji pevném tužte se s chutí,
statečně, bratří, vždy bděte,
dbejte, ať naše světové hnutí
mohutní, roste a kvete!

Prodírat chcem se třebaš i hložím,
aniž nás překážky zmatou,
proniknem všudy po světě božím,
vázání přísahou svatou.

Nesnáze, trudy, liknavá práce —
nic nás už nesmí teď zmoci;
bez mrzkých obav dokážem v krátce
všechno, co v naší jest moci.

Skrovná je dosud zdolaná dráha,
daleko ještě je k cíli;
mý tam však dojdem: úsporná snaha
dodá nám potřebné síly.

Ano, my dojdeme ke svému cíli:
cítímeť plameny v hrudi.
Však my tam dojdeme: dost je té síly,
která nás vytrvat pudí.

Vznešený cíl náš, idea skvělá
záruku vítězství dává.
Hrdě pak, bratří, vypneme čela,
vděčnost nám kyne a sláva.

MOJE MYŠLENKA

Síranou světa na paloučku
v létě, když se připozdívá,
známá dívka přátel hloučku
o naději píseň zpívá.
O číms promarněném žití
slovy pěje soustrastnými;
zas mé srdce rány cítí,
bolí mě a krvácí mi.

»Což jste usnul, že tu, pane,
sedíte tak bez pohnutí?
Na luzné snad dětsví rané
vzpomínat vás cosi nutí? —
Co jsem jí měl na to říci?
Těžko postesknout si krásce
znaveně si hovějící
v letní večer po procházce.

Myšlenko má, chvíle děsu,
naděje a strasti moje,
kolik už vám beze hlesu
obětí mnou sneseno je!
Povinnost má velela mi
dát, co nejvíc máme rádi:
jí isem vkládal se slzami
na oltář své vlastní mládí.

Plamen cítím hárat v hrudi,
žití i mně by bylo milé,
cosi mě však věčně pudí
prchat z družce rozjařilé...
Lopotné-li moje snahy
nemají snad nikam vésti,
nechaf ve hrob klesnu záhy
s nadějí svou — bez bolesti!

ZTIŠ SE MI, SRDCE!

Ó, ztiš se, srdce, nebuš v nepokoji,
jak prolomit bys chtělo svoji skrýš!
Již tlumím stěží dávnou tíseň svoji,
ó, ztiš se, ztiš!

Zda po všech trudech z rozhodného boje
přec vyjdu vítězně — či padnu spíš?
V svém tepu bouřném ustaň, srdce moje,
ó, ztiš se, ztiš!

Karolo Piĉ: Supersignitaj literoj en Esperanto

(Kelkaj observoj kaj rimarkoj)

Sonoj, la lastaj simplaj elementoj.

La lastaj simplaj elementoj de la parola sinesprimado de ĉiu lingvo estas sonoj.

Sen ili ja povus ekzisti ia signaro eble komprenebla kaj legebla, kiel ideografiaj kaj piktografiaj literaroj pasinttempaj, sed neniam elparolebla kiel ekz. la franca lingvo aŭ Esperanto. Ĉar la plej grava rolo de la lingvo estas servi ne nur kiel skriba interkomprenilo videbla, sed antaŭ ĉio ankaŭ kiel interkomprenilo parola! Sur la skriba kampo oni jam trovus iajn signojn de ĉiuj kompreneblajn. Sed la parola interkomunikado restas sen aŭdeblaj sonoj ĝis nun nesolvebla.

Sekve de tio ankaŭ la Internacia Lingvo devas adopti ilin, por bazi sur ili sian aŭdeblan kaj perorele percepteblan esprimoriĉecon.

28 sonoj de Esperanto.

Esperanto solvas la problemon de la aŭdebla sinesprimado, elektante dudekok sonojn inter la jam ekzistantaj sonoj de la aliaj lingvoj; kaj kombinante ilin, ĝi kreas la substantivojn, adjektivojn, adverbojn, verbojn kaj la aliajn.

Sian sonan sistemon konkorde kun la ceteraj lingvoj ĝi nomas **alfabeto**.

Laŭ kompetentaj asertoj la esperanta alfabeto estas latinida kaj ne multe diferencas de la alfabetoj de ĉefaj eŭropaj lingvosistemoj. Tiu ĉi aserto pravas, tamen ne tute absolute. Certaj esceptoj estas farendaj, precipe rilatè al kelkaj supersignitaj literoj, kiuj ne nur laŭlitere, sed ankaŭ (kaj precipe) laŭsone estas pli slavdevenaj ol latinidaj. Cetero tian ni pli profunde esploras ankoraŭ pli sube.

Grafia flanko de la esperanta alfabeto.

Siajn sonojn Esperanto videble interpretas per literoj. La literoj, kiuj en Esperanto respondas al ĝiaj dudekok sonoj, estas:

Aa Bb Cc Ĉĉ Dd Ee Ff
Gg Ĝĝ Hh Ĥĥ Ii Jj
Kk Ll Mm Nn Oo Pp Rr
Ss Ŝŝ Tt Uu Ŭŭ Vv Zz

Per tiuj ĉi nemultaj signoj la lingvo esprimas la plej delikatajn sentojn kaj ideojn en maniero ĉiam renova kaj revarianta.

Ĉiuj estas skribataj latine, kiel en la plej multaj aliaj lingvoj (la franca, angla, hispana, pola, ĉeĥa kaj s.); neniam greke α , β ; aŭ ruse, ĥine kaj alimaniere. La kaŭzo ne estas la netaŭgeco da la ĵus nomitaj sistemoj aŭ la supereco de la latina, nek la nombra plimulto tiun aŭ alian sistemon aplikanta, sed sole la malkomplikado kaj relativa teknika simpleco de la latinaj **A, B, C**, kvankam la nombra plimulto kaj la aliaj cirkonstancoj pli supre diritaj, estas ankaŭ iom konsiderataj, precipe pro la tutmonda rolo de la eŭropa kaj usona kulturo, kiu vastigas la konon de la latina aboco ankaŭ al la aziaj kaj afrikaj nacioj.

La latina deveno de la esperanta aboco.

Cetero la elekto de la latina aboco, kiun Esperanto adoptas por sia skriba kaj vida sinesprimado, reprezentas la solan vidpunkton, en kiu ĉiuj lingvoj internaciaj renkontiĝas konkorde kaj sendiskute (ldo, Esperantido, Okcidentalo ktp.). Eĉ pastro Schleyer, kiu iris tre malproksimen, elektante la radikojn de Volapiko, pastro Schleyer, kiu preskaŭ tute forviŝis ilian ne nur internacian, sed eĉ originan karakteron, kripligante ilin ĝis nerekonlebleco, ne kuraĝis anstataŭigi la latinan abocon per iu alia aboco, eble elpensita, ĉar eĉ li konsciis, ke la rompo de ĉi tiu malnova tradicio povus tro endanĝerigi la progreson de la lingvo de li elpensita.

Verdire la latina skribadoformo estas tiom ligita kun la

ĝenerala eŭropa kulturo, ke la elekto de iu alia aboco devus esti konsiderata kiel grava malprogreso kaj nepra ekpaŝo malantaŭen. Tion cetere konscias eĉ tiuj nacioj, kiuj aplikas aliajn abocojn, ol estas la latina. Ili eble ne konfesas tion buŝe. Sed ilia senbrua kaj iompostioma forlasado de la propraj alfabetoj naciaj estas argumento plej elokventa. Ni citu nur la germanan lingvon, kiu apud sia propra skribmaniero uzas la latinan samkvante kaj samtaŭge. Kaj en la aliaj nacioj, kiuj ĝis nun ne aplikas ĝin, aŭdiĝas jam voĉoj, dezirantaj ĝin enporti; kiel ekz. en la japana lingvo, kies anoj pli kaj pli multe eklendas pri sia literaro, ja unika kaj mirinda, sed bedaŭrinde — malsimplega kaj praktike malfacile aplikebla.

Ĝia malnova tradicio.

Fakte la latina aboco reprezentas ne nur la plej praktikan kaj plej ofte aplikatan skribon kaj signan sistemon de la ekstera kaj videbla sinesprimado, sed ankaŭ la plej altan punkton, kiun ĝis nun la skriba kaj teknika esprima kulturo sukcesis atingi. Ĝi reprezentas la lastan stadion de la longa vojo, serpentumanta de prahomaj bildoj engrotaj preter hieroglifoj kaj kojnosignoj malnovtempaj al la nuna skribmaniero moderna. Kaj ĝia malakcepto rekte egalus stultan kaj neniel argumentitan malaprobon de tiu longega kaj mirinda tradicio, ĉe kies kreado ses jarmiloj asistis, oferante al ĝi siajn fortojn, siajn intelektajn kaj sian genion. Ĉar jarmilojn daŭris, antaŭ ol oni sukcesis knedi la nelertajn skribbildojn en severajn formojn hieroglifajn. Kaj pluajn jarmilojn daŭris, antaŭ ol oni sukcesis evoluigi la malmodernajn kojnosignojn ĝis la nuntempa literaro latina.

Supersignoj.

Se la aboco de Esperanto estas latinidevena, la tegmentofarmaj grafikajoj **^** super **ĉ, ĝ, ĥ, ĵ** kaj **ŝ**, la tiel nomataj **supersignoj**, kiuj ŝanĝante la grafikan aspekton de la litero, kaŭzas samtempe ankaŭ la ŝanĝon de ĝia sona karaktero, estas nek latinidevenaj nek francdevenaj. La fakto, ke malgraŭ ĉio ili sub la sama formo sufiĉe ofte aperas en la franca lingvo, ne malkonfirmas la supre diritan, sed male ĝin konfirmas, ĉar en la franca ilia rolo estas pure **akcenta**, do esence alia ol en Esperanto, en kiu ili funkcias kiel ŝanĝiloj sonaj. En tiu ĉi funkcio estas necese serĉi por ili analogion aliloke ol en la latinida kaj ĝermana familioj, kaj ekrigardi al la slavaj lingvoj, en kiuj diversaj **^** svarmas, kvankam ne ĉiam sub la tute samaspekta formo. Ekzemple la ĉeĥaj **č** kaj **š** ja renversas la esperantan **^**, sed alie ili kondutas tute same kiel **ĉ** kaj **ŝ**, ne nur grafike, sed ankaŭ sone. **Ĥ, ĝ** kaj **ĵ** (ĉeĥa **ž**) estas grafikaj propraĵoj de Esperanto kaj ili utile simpligas la alilingvajn **ch, x, dj, dg, dž** kaj **j**. Ili kune kun la supersignita duonvokalo **ŭ** mankas, kiel ni jam diris, en la alfabetoj ĝermanaj kaj latinidaj, kvankam la **sonoj ĉ** kaj **ĝ** svarmas en la angla lingvo, **ĥ** en la slavaj idiomoj kaj la germana, **ĵ**, **ŝ** en la franca; sed ilia grafika aspekto krom la jam supre cititaj slavaj **č** kaj **š** estas ĉiam pli malpli diferenca de tiu de la esperantaj **ĉ, ĝ, ĥ, ĵ** kaj **ŝ**, en kiuj la supersigno **^**, krom sia rolo de ŝanĝilo sona, ludas samtempe la rolon de ŝanĝilo ideo en multaj vortoj sone kaj aspekte similaj, sed malsimilaj laŭsignife, kiel akz. **ĥoro** — **ĥoro**, **ĵuro** — **ĵuro**, **ĉaro** — **ĉaro**, **ĝenerala** — **ĝenerala**, **ŝako** — **ŝako** ktp.

Plue la rolo de la supersigno estas konservadi al la vortoj ne nur la internacian grafion **j, g** kaj simile, sed ankaŭ la sonadon **ĵ, ĝ** k. s. Ekzemple la substantivo **ĝardeno** (germane **Garten**, angle **garden**, france **jardin**, itale **giardino**) konservas ne nur la formon (**g**) de la unuaj (**Garten, garden**), sed ankaŭ la proksimume identan sonadon (**ĝ**) de la aliaj (**jardin, giardino**).

La supersigno \wedge aperas do kiel senkompara ilo por la akiro de relative la plej granda komprenebleco de vortoj, ne nur laŭsone, sed ankaŭ laŭaspekte kaj laŭforme.

Krome, ĝia praktike teknika utileco estas nekontestebla, se oni komparas la esperantajn supersignitajn literojn, ekz. \hat{c} aŭ \hat{s} , al la signaro fortimiga, klun bezonas la aliaj lingvoj por esprimi la samon. Tiel la germana lingvo devas uzi kvar literojn (*tsch*) por esprimi la solan sonon \hat{c} , kaj tri literojn (*sch*) por esprimi la sonon \hat{s} , dum en Esperanto tri aŭ kvar literoj kune kaj apude jam sufiĉas por la esprimo de elementaj ideoj: mono, sur, homo kaj s.

Ilia praktika valoro.

La praktika utileco de la esperantaj \wedge estas nepre sufiĉe klara. Tamen multaj paroloj kaj diskutoj estis direktitaj kontraŭ la alfabeto de Esperanto entute, kaj la supersignoj speciale. La plej multaj aŭtoroj deklaris ilin maltaŭgaj (inter ili precipe de Beaufront montriĝis ilia plej arda malamiko), kaj la internaciaj lingvoj, aperintaj post 1887, evitadis ilin atenteme kaj ŝaluze. Ni ĉiuj nur la misfaman Idon (kreaĵon de Louis Couturat), kiu konsekvence anstataŭigis la esperantajn \hat{c} , \hat{s} , \hat{i} , \hat{g} , \hat{h} kaj \hat{u} per pli komplikaj *y*, *ch*, *sh*; *j* (kiun ĝi uzas senelekte jen anstataŭ la esperanta \hat{i} , jen anstataŭ la esperanta \hat{g} , enkondukante por la sono *j* la grafikan signon *y*), *kh*, *u* kaj *w*. La saman alfabeton aplikis ankaŭ Esperantido, kiu fakte nur imitis la sistemon de Ido, starigante apud Idaj *ch*, *sh*, *i*, *kh* kaj *w* siajn *ch*, *sh*, *j*, *kh* kaj *w*. Kaj ambaŭ lingvoj, malgraŭ sia brua fanfaronado pri logikeco kaj simpleco, grave rompis ĝuste la logikon kaj simplecon laŭdegatajn.

Kiel senperan sekvon de la forŝovo de la esperanta supersigno Esperantido kaj Ido eksentas necesecon kreadi formojn kiel *yuro*, *yusta*, *kajo*, *sonjo*, *jemar* kaj *s.*, kiuj estas nepre malpli klaraj kaj kompreneblaj ol la esperantaj *ĵura*, *ĵusta*, *kaĝo*, *sonĝo*, *ĝemi* kaj *s*. La forŝovo de \wedge en ili koncernas ilian vortaspekton kaj internaciecon de ilia grafio, kaj sekvigas kaoson inter *y* kaj *j*, kiu ne nur en la Alfabeto de Internacia Fonetika Asocio, sed ankaŭ en ĉiuj lingvoj mezeŭropaj kaj orienteŭropaj estas uzata kiel esprimilo de la konsonanta, duonvokala *i*, sed neniam kiel esprimilo de \hat{i} aŭ \hat{g} .

Same gravaj kiel la interŝanĝoj de *j* kaj *y* estas ankaŭ la ceteraj intermiksoj de la Ido kaj Esperantida alfabetoj, nome iliaj *kh*, *sh* kaj *ch*. Ilia ekziston Ido kaj Esperantido defendas per neniel pruvita apriora aserto, ke la forigo de la supersignoj estas taŭga, faciligante ne nur la ordinaran manskribadon, sed ebligante ankaŭ la maŝinskribadon de Idaj kaj Esperantidaj tekstoj, kaj iliajn presadon kaj telegrafadon.

Ili eĉ citas kelkajn internaciajn vortojn, por senkulpiĝi sian sensupersigan sistemon kaj ĝiajn kombinaĵojn, montrante ke ekzemple *ch* estas legata kiel \hat{c} ankaŭ en la usona *Chicago*, *sh* kiel \hat{s} en la samdevena *Washington*, *kh* kiel \hat{h} en la fremdaj *khan* kaj *khedive*, kaj *y* kiel \hat{j} en *tramway* kaj *rayon*. *X* kaj *q* eĉ donas al ili pluajn plurajn ekzemplojn. Sed malgraŭ tiuj ĉi apologioj ili malpravas. Esperanto, kiu ŝatas siajn supersignojn cetere ne multegajn, montras vanecon de iliaj asertoj. Esperantaj tekstoj estas presataj en la plej diversaj presejoj, esperantaj telegramoj flugas de kontinento al kontinento, sed nek presejoj nek telegrafejoj estas embarasataj de iliaj supersignoj. Male, la supersignoj donas al tekstoj ilian specialan kaj interesan karakteron, tre konatan al la esperantistoj. Kaj ili (memkompreneble ankaŭ la tuta alfabeto de Esperanto) montriĝas severe kaj konsekvence logikaj, ĉiam, ĉie kaj ĉiel. Ili ne rompas la logikon kiel la Idaj kaj Esperantidaj *kh* kaj *sh*, *ch* kaj *w*, kiuj, konsistante el pluraj literoj, permesas al la leganto legi la literojn *c* kiel *c* kaj *h* kiel *h* en la plej multaj vortoj kiel *cedi* aŭ *herbo*, sed malpermesas al li legi *chambro* analogie *c-hambro*, kiel

oni atendus, devigante lin malanalogie kaj malkonsekvence al *ĉambro*. Same pri *s-h* kaj *kh*. Tamen en *newtrala* (atentinda monstraĵo Esperantida!) Esperantido — iom malfrue! — alrapidis, por savi la logikon, distingante la vokalan *u* de la duonvokala per la fremda kaj unika *w* (esperanta \hat{u}). Tiel ne ogas Esperanto, kiu estas logika ĉiam kaj ĉie. Ĝiaj *c*, *k*, *h*, *s* kaj aliaj ne estas legataj jen *c*, *k*, *h*, *s*, jen \hat{c} , \hat{s} , \hat{h} , \hat{i} (laŭ la pozicio inter la aliaj literoj), sed ĉiam nur *c*, *k*, *h*, *s*.

Esperanto estas fonetika; nur malmultaj lingvoj povas esti komparataj al ĝi. Esperantido kaj Ido kontraŭe ne estas fonetikaj. Ili daŭrigas la kaoson volapikan tradicion, kiu trovas lokon en pli malpli preskaŭ ĉiuj homaj lingvoj, provantaj malrapide kaj poparte evolui de origina senorganiza malordo al organizita malordo venonteca, sed ne provantaj evolui de la komenca malordo estinta al la dezirata ordego estonta.

Provo ne izola

Cetere la supersigna sistemo de Esperanto estas nek izola eksperimento de la Lingvo Internacia, nek revolucia novaĵo, trovanta analogion en neniu ajn idiomo natura; sed kontraŭe malnova elpensajo, kiu siadevene apartenas al la malproksima estinteco, kaj kies radikojn estas necese serĉi rekte en la Mezepoko.

Jam en 1411 ĉeĥa sciencisto magistro Johano Hus, ekleziulo kaj herezulo tiutempa, mortinta fine sur brullignaro, reformis la ĉeĥan skribmanieron, kiu, uzite de la plej malnovaj tempoj ĝis la fino de la XII-a jarcento, tiom malboniĝis kaj mallertiĝis, ke en la XIV-a jarcento ĝi estis jam apenaŭ legebla kaj skribebla. Ankaŭ laŭaspekte ĝiaj tekstoj estis malplaĉaj kaj neĉarmaj.

Unu el la plej frapaj pekoj tiutempaj estis la esprimado de *diversaj* sonoj per unu sola kaj maldiversa litero. En la XIV-a jarcento poste ankoraŭ aliaj pekoj aliĝis: du aŭ tri literoj kune kaj apude estis uzataj por la esprimo de unu sola sono: *cz* anstataŭ *c*, *zz* anstataŭ *s*, *czz* aŭ *chc* anstataŭ \hat{c} , kaj simile (la samo okazas ankoraŭ nun en diversaj lingvoj germanaj kaj latinidaj (*tsch* anstataŭ \hat{c})). Longaj vokaloj estis duobligataj. Anstataŭ la longa *a* oni skribis duoblan *aa*, anstataŭ la longa *e* — *ee*, anstataŭ la longa *u* — *uu*, ktp. Ankaŭ *i* kaj *y* estis intermiksitaj; kaj la greka *y* iom post iom ekokupis la poziciojn, kiuj ĝis tiam estis rezervitaj sole al *i*. La abismo inter la ĉeĥaj grafio kaj prononco iĝis iom simila al tiu, kiu nuntempe disas inter la anglaj grafio kaj prononco. Iu reformo estis farenda. Magistro Johano Hus surpris ĝin. Konante la hebrean kaj glagolan lingvojn, en kiuj al unu litero respondas ĉiam nur unu koresponda sono, li aplikis la saman sistemon (la fonetikan sistemon de Esperanto) ankaŭ al la ĉeĥa lingvo. Sed ĉar la 24 latinaj literoj ne sufiĉas por la esprimo de la 32 sonoj ĉeĥaj, li elpensis specialan manieron, kiu ebligis al li esprimi grafike ankaŭ tiujn 8 sonojn, kiujn la latina lingvo ne posedas.

Li procedis same kiel, kelkajn jarcentojn pli poste, doktoro Zamenhof. Lia maniero estis identa al tiu de Esperanto. Liaj supersignoj nur laŭekstere iom diferencis de tiuj de la Lingvo Internacia. Anstataŭ la tegmentoformaj grafikaĵoj super *c*, *s* kaj la aliaj li uzis simplajn punktojn kiel super *i* (\hat{c} , \hat{s} = \hat{c} , \hat{s}). Tiuj punktoj en la daŭro de jarcentoj ŝanĝiĝis je hoketoj. Nuna ĉeĥa lingvo uzas \vee anstataŭ ilin (\hat{c} , \hat{s} = \hat{c} , \hat{s}). Sed la supersiga sistemo estas depost tiuj tempoj eĉ de la plej eminentaj lingvistoj konsiderata kiel unu el la plej perfektaj skribmanieroj; kaj ĝia taŭgeco precipe en la transskribado de orientaj kaj aliaj idiomoj estas rekonata.

La esperanta \wedge reprezentas la lastan ĉeneron en la longega evoluoceno, iranta de la mezepoka ĉeĥa trans \vee al la nuntempa internacia \wedge . Ĝi ankaŭ montras, ke la bazoj de Esperanto ne estas tiel hazardaj, kiel ilin volus deklari kelkaj kredemaj naivuloj, sed male, ke ili elkreskas ne nur el la sama humo, el kiu kreskis kaj kreskas la aliaj lingvoj kaj idiomoj, sed eĉ el tiu humo, el kiu fontas,

devenas la tuta mondkulturo kaj mondscienco entute. Ĝi montras, ke diversaj fenomenoj de Esperanto ne estas izolaj elpensitaĵoj de la Lingvo Internacia, sed fakte nur malnovaj ĝeneralizaĵoj kaj ĉiamaj, kies neniam ŝanĝiĝantan historion oni povus sekvi ĝis la tempoj de la ŝtonepoka prahomo. Ĝi pruvas, ke Esperanto ne estas lingvo juna, kiel oni asertis ofte kaj oftege, sed male maljuna kaj malnova kiel la piramidoj de Nilujo. Kaj ĝi evidentiĝas, ke la tradicio de Esperanto ne ampleksas kvin aŭ ses jardekojn, sed kvin aŭ ses jarmilojn.

lom da historio.

Fine, ke la supersigna sistemo estas taŭga, pravas interalie ankaŭ la fakto, ke la supersignoj konserviĝis kaj montriĝis utilaj ne nur en la ĉeĥa lingvo, kiu ilin adoptis kaj uzis jam en 1411, sed ke ili iĝis bazo de ortografiaj plibonigoj kaj reformoj ankaŭ ĉe aliaj anoj de la slavlingva familio. En 1835 reformis laŭ ili sian ortografion Kroatoj. En 1838 Luzaciaj Serboj, gvidataj de A. Smolér kaj P. Jordán aliĝis al la reformintoj; kaj en 1845 karintiaj Slovenoj per la agado de D-ro Bleiweis ordigis sian skribmanieron laŭ ili. Cetere ankaŭ la Poloj en la daŭro de la tempo verŝajne estos devigataj adopti ilin, ĉar la nuntempa situacio de ilia lingvo estas jam multrilate simila al la situacio de la ĉeĥa antaŭ 1411.

Sed eĉ neslavaj lingvosciencistoj rekonis utilecon de la supersignoj kaj sukcesplene ilin aplikis en la sonsignado de lingvoj orientaj kaj ceteraj lingvoj ekstereŭropaj. Antaŭ ĉiuj aliaj uzis ilin dana lingvisto Erasim Rask, kiu esprimis per latinaj literoj dek siblajn sonojn, kutimajn en orientaj idiomoj, kaj trovinte en la ĉeĥa lingvo krom **c**, **s** kaj **z** parencajn siblajn sonojn **č** (ĉ), **š** (ŝ) kaj **ž** (ĵ), li enkondukis ilin en la lingvojn iberan kaj armenan. En la armenan li krome enkondukis ankaŭ la ĉeĥan **ř** (ri), kiu trovas sin nek en Esperanto nek en la plej multaj lingvoj aliaj. kaj kiu estas pli malpli privilegie unikaĵo de nur kelkaj lingvoj slavaj. Li eĉ laŭde aludis ke »tiuj ĉi sonoj estas en neniu alia idiomo tiel nature, simple kaj konsekvence skribataj kiel en la ĉeĥa«, kaj invitis la lingvistojn apliki ilin ankaŭ en aliaj idiomoj. Komparu lian traktaĵon: Commentatio de pleno systemate decem sibilantium in linguis montanis, item de methodo, Ibericam et Armenicam linguam literis Europaeis exprimendi. Havniae 1832.

Post Rask glorioplena F. Bopp, invite de Rask, enkondukis supersignitajn literojn en sian verkon Kompara gramatiko de lingvoj hindeŭropaj (Vergleichende Grammatik des Sanscrit, Zend, Griechischen, Lateinischen etc., Berlin 1833) malgraŭ tio, ke ankoraŭ en la Gramatiko de sanskrito, aperigita en 1824 kaj 1829 li esprimas siblajn kaj aliajn, en kelkaj lingvoj nekutimajn, sonojn per literaj grupoj germanmanieraj **sch**, **tsch**, **dsch**, **dschh** kaj simile. Post Bopp transskribas per supersignitaj literoj sanskriton jam preskaŭ ĉiuj sciencistoj sanskriton studantaj.

Ja eĉ kelkaj esploristoj de lingvoj semidaj adoptis en siaj verkoj la supersignan sistemon, similan al tiu de Esperanto, kiel ekz. Caspari en la Araba Gramatiko (Grammatica Arabica, Lipsiae 1844) kaj Fleischer en la Gramatiko persa (Grammatik der lebenden Persischen Sprache, Leipzig 1847). Sed plej vaste kaj plej sprite utiligis la supersignan sistemon la fama R. Lepsius, kiu kompilis laŭ ĝi Ĝeneralan alfabeton lingvosciencan, destinitan al la uzado fare de misiistoj. En tiun ĉi alfabeton li akceptis ne nur la siblajn sonojn **š** kaj **ř** kaj la literojn **ñ**, **ř** kaj **l**, sed eĉ dudek literojn aliajn, kiujn ĉi li distingis per supersignoj (vidu lian verkon: Das allgemeine linguistische Alphabet, Berlin 1855). Fine ankaŭ la fama angla lingvosciencisto Max Müller, kompilante sian Alfabeton por misiistoj (The languages of the seat of war in the East, London 1855), ofte uzis supersignitajn literojn.

Per Esperanto la ĉeno fermiĝas.

Tamen Esperanto, alpreninte la supersignan sistemon, ne

kontentiĝis je la nura kaj blinda imito de malnova tradicio. Ĝi tro bone sciis, ke la malnovaj tradicioj estas tre ofte mankohavaj kaj neperfektaĵoj. Tial ĝi adoptis nur la bazojn, kaj sur ili ĝi konstruis sian sistemon propran, post zorgaj kaj atentemaj esploroj kaj konsideroj.

Magistro Johano Hus, kiu reformis la ĉeĥan lingvon kaj mirinde simpligis la skribadon de la sonoj **č**, **š** kaj aliaj, forgesis simpligi la skribadon de la sono **h**, al kiu li konservis la malnovan, kontraŭlogikan kaj nefonetikan grafion **ch** (cetere tiu ĉi forgeso kaj preterlaso, eble hazarda, eble intencita, estis al li ofte riproĉata de liaj samlingvaj posteuloj, kiuj ofte demandis, kial li anstataŭ **ch** ne uzis supersignitan **h**; tamen **ch** konserviĝis ĝis la nunaj tempoj, ĉar neniu post li kuraĝis reformi ĝin).

Doktoro Zamenhof kontraŭe agis pli konsekvence kaj logike. Reforminte **č**, **š**, **ĝ**, kaj **ř**, li ne forgesis reformi **h**. Li montriĝis genia pleniganto kaj kompletiganto. Kaj tial Esperanto ankaŭ tie ĉi reprezentas ne blindan kaj nuran imitaĵon, sed kulminon kaj la plej altan punkton, kiun ĝis nun la fonetika lingvokulturo sukcesis atingi. Per Esperanto fakte la ĉeno fermiĝas.

Kaj sub tiu ĉi vidpunkto vidiĝas stultaj ankaŭ ĉiuj **ch**, **sh**, **kh** kaj la ceteraj provaĵoj de ldo, Esperantido, Okcidentalo kaj la aliaj, kies sola valoro dubvalora estas ilia persista kaj obstina marŝado returnen, en tiun senorganizan kaj senregulan kaoson, el kiu sole Esperanto sukcesis eliĝi plene kaj perfekte. Kaj en tiu ĉi punkto krome troviĝas eĉ la solvo de la demando pri la sukcesmistero de Esperanto; kaj la klarigo de tio, kio igis ĝiajn konkurintojn malsukcesi. Kiel la ĉefa kaŭzo ne evidentiĝas tie ĉi iu, cetere tre relativa, pli aŭ malpli granda perfekteco (eĉ Volapiko posedis ian certan kaj propran perfektecon nekontesteblan), sed sole diverseco de la direkto. La direkto de Esperanto estas simpla: Ĝi ne estas la direkto de lumradio! La direktoj de ĝiaj konkurintoj estas ŝajne pli naturaj: Ili estas la direktoj de lumradioj. Kaj la konkurintoj tion konscias, brue fanfaronante pri tio. Sed ilia fanfaronado estas antaŭtempa. La radioj ja elkuras el la suno, sed ili celas en mallumon. La musoj kontaktaĵe el mallumo venas, sed la lumo ilin fine englutas. Jen, kial la konkurintoj de Esperanto, malgraŭ ĉiuj profetaĵoj kaj supozoj, konstante mortas, velkas, malgrandiĝas kaj foriĝas, dum Esperanto ĉiam kreskas, plifortiĝas kaj malmortas.

Du eblecoj.

Estas menciinde, ke krom la supersigna sistemo doktoro Zamenhof kreis ankaŭ paralelan sistemon sensupersignan, en kiu li anstataŭigis la supersignojn per iomete maloftaj, kaj en kelkaj lingvoj laŭsone eĉ tute nekonata litero **h**. Tiamaniere krom **č** li kreis **ch**, krom **ĝ** — **gh**, **h** — **hh**, **ř** — **jh**, kaj **š** — **sh**. Tiu ĉi sistemo estis origine elpensita por presejoj, ĉar en la unuaj tempoj de Esperanto nur malmultaj presejoj posedis la supersignitajn esperantajn literojn, kaj tial iam okazadis ke, antaŭ ol oni havigis al si la supersignitajn literojn, oni devis dume presi esperantajn tekstojn sen ili. Por ke neniu konfuzo okazu, d-ro Zamenhof kreis al la supersignitaj literoj **č**, **ĝ**, **h**, **ř**, kaj **š** la ĵus diritajn ĝemelojn sensupersignajn. Tial oni kelkiam renkontas esperantajn tekstojn kun iom kuriozaj esprimoj kiel: **Shi estis charma kaj dolcha**. Sed tiaj tekstoj estas relative tre maloftaj, kaj ili preskaŭ senescepte apartenas nur al la unua periodo de Esperanto. Ju pli signifo de Esperanto grandiĝadis kaj kreskis des pli similaj »neesperantaĵoj« iĝadis maloftaj kaj raraj. Nuntempe la kombinaĵoj **ch**, **sh** kaj similaj ne estas plu renkonteblaj. La presejoj posedas la supersignitajn esperantajn literojn grandare, kaj se iu presejo tamen ne havas ilin ĝis nun, ĝi havigas ilin al si, se la presado de esperantaj tekstoj estas mendata ĉe ĝi. **Ch**, **jh**, **gh**, **sh** kaj **hh** estas nun nur ŝtoniĝintaj kaj polvumitaj historiaĵoj. Oni ne trovas ilin plu en la tekstoj. Sed malgraŭ tio ili ne estas sekretaĵoj nekonata. Oni citas kaj represas ilin en ĉiuj lernolibroj kaj

gramatikoj de Esperanto, tute senutile kaj nenecese, ĉar ilia uzoneceseco ne ekzistas plu. Tamen ilia valoro, pli argumenta ol praktika, estas nekontestebla. Praktike ili estas superfluaĵoj. Sed argumente ili pravas, ke la lingvo en sia unua periodo staris antaŭ du eblecoj: ĝi povis elekti aŭ la supersignan sistemon, aŭ la sensupersignan. Ambaŭ sistemoj estis uzataj kaj aplikataj en ĝi. Kaj ambaŭ sin proponadis al ĝi egale kaj samgrade. Se ĝi tamen spontane kaj sen iu ajn influo ekstera elektis la supersignan sistemon, pravas argumente, ke la supersigna sistemo estis pli taŭga kaj praktika.

Eĉ tie ĉi Esperanto ne decidis mem. Ĝi lasis la naturon decidi la demandon. Kaj ĝi poste nur adoptis tion, kion la naturo sankciis kaj konfirmis. Kaj ĝuste en tiu ĉi karakteriza kaj unika trajto de Esperanto kuŝas ĝia granda kaj nepriskribeba natureco mirinda. Esperanto ne estas natura kiel la aliaj lingvoj. Ĝia natureco estas pli altgrada. Kaj jen, kial ĝuste ĝi tiom multfoje estas dirata kaj konsiderata nenatura.

Multigantoj de la sonriĉeco.

La fremdaj **x**, **q** kaj **w** mankas en Esperanto. Ĉar ili grafike simbolas sonojn, kiuj ne estas elementaj kaj simplaj, Esperanto analizas ilin kaj en la skribo anstataŭigas ilin per la respektivaj **ks** aŭ **kz**, **kv** kaj **v**.

Simile kiel **st**, **gn**, **ps** kaj la aliaj, ankaŭ **ks**, **kz** kaj **kv** estas nur simplaj konsonantaj grupoj, prononcataj kune aŭ malkune, depende de sia pozicio inter vokaloj. La fakto, ke lingvoj kiel la latina, greka kaj kelkaj aliaj pli modernaj tamen ilin skribas **x**, **q** anstataŭ **ks**, **kz** kaj **kv**, reprezentas efekton nur grafikan, teknikan, kaj ne fonetikan; same kiel nur grafike simpligan efekton reprezentas la kvazaŭ-litero **&**, anstataŭanta la oftajn **et** en la latinaj kaj alilingvaj volumoj pasinttempaj, aŭ la sama **&**, anstataŭanta la multnombrajn kaj svarmantajn kaj en kelkaj scienckarakteraj literaturaĵoj esperantaj.

Cetere, ke la lingvoj povas vivi kaj ekzisti sen **q**, **x** kaj **w**, sufiĉe klare montras la slavaj lingvoj, en kiuj **q**, **x** kaj **w** entute mankas; plue la latina lingvo, nehavanta la duoblan **w**, kaj la germana, kiu ne posedas **x** (kelkaj fremdaj vortoj, kiuj ĝin tamen posedas, ne pravas la malon, sed, estante esceptaĵoj, nur des pli forte konfirmas la supre diritan).

Tamen Esperanto, kiu (kiel ni ĵus vidis) analizas la fremdajn **x** kaj **q**, ne iras en sia analizemo tro malproksimen kaj ne malkunmetas **ĉ** en **tŝ** kaj **ĝ** en **dĵ** (ĉar ĉe la kunmetaĵoj **ĉ** kaj **ĝ** la kategorioj estas multe malpli solidaj ol ĉe **ks** kaj **kv**), sed konservas la literojn **ĉ** kaj **ĝ** por esprimi per ili la kvazaŭelementajn sonojn **ĉ** kaj **ĝ**, kiuj tute ne estas tiom severe identaj kun **tŝ** kaj **dĵ** kiel ekz. **q** kun **kv**.

La malsolideco de la kategorioj tie ĉi estas do plua plura argumento, pruvanta la mirindan taŭgecon de la esperantaj supersignoj, kiuj donas al la lingvo ĝian specialan karakteron, kaj kiuj per maniero simpla kaj natura riĉigas ĝian fonetikon je pluraj molaj sonoj, mankantaj en kelkaj idiomaj malpli riĉaj.

Ĉe **ĉ** kaj **ĝ** ekz. ili kreas kvazaŭ novajn sonojn, kiuj tute ne estas strikte egalaj al **tŝ** kaj **dĵ**. Ili estas **tŝ** kaj **dĵ**, al kiuj estis pruntedonitaj apartaj nuancoj kaj koloroj.

La sobreco de ilia uzado.

La longaj vokaloj de kelkaj lingvoj, precipe la slavaj, **á**, **é**, **í**, **ó**, kaj **ú** (aliaj ol la esperanta **ŭ**, kiun kelkaj presejoj tamen presas same **ŭ**), aŭ la latinaj longaj **a**, **e**, **i**, **o**, **u** ankaŭ ne ekzistas en la Lingvo Internacia, kvankam Esperanto laŭsone konas ilin. Ekz. **a** de la vorto **patro** estas malpli longa ol **a** de **amo**; la komenca **o** de **oro** diferencas longece de la fina **o** de la sama **oro** k. s. Sed Esperanto, kontraste al la aliaj lingvoj, ne bezonas distingadi la mallongajn **a**, **e**, **i**, **o**, **u** de la longaj, ĉar en lingvo, kiel Esperanto, la longeco de la vokaloj ne

ludas tian rolon, kian en la aliaj idiomaj, ekz. la slavaj, en kiuj la signo de longeco ludas ofte la rolon de sanĝilo signifa lekz. la ĉeĥa **dál** signifas **plue**; **dál** egalas la esperantan li **donis**, ktp. La samon ni jam vidis ankaŭ ĉe la esperantaj **á**, kiuj en la vortduopoj **horo — hora ŝako — sako** ktp. kondukas analogie). Cetere Esperanto eĉ laŭsone ne emas al troaj diferencoj inter la longaj **a**, **e**, **i**, **o**, **u** kaj la mallongaj, kion pravas la regulo pri ilia elparolo, kiu konsilas prononcadu ilin nek tro fermite, nek tro malfermite; kaj ne tro longigadi ilin. Sekve de tio la lingvo evitas ilian signadon bone sciante, ke kelkaj supersignoj (**ĉ**, **ĝ**, **h**, **ĵ**, **ŝ**), prezentas utilan simpligon por la lingvo, sed multaj facile povus fariĝi balasto (kaj ŝarĝaĵoj).

La ĵus dirita do montras, ke Esperanto ne estas maŝino senanima aŭ io alia, same ŝtona kaj serviva (kiel provadis aserti kelkaj homoj, konantaj el Esperanto apenaŭ ĝiajn nomon kaj titolon), sed male, ke ĝi estas vivanta organismo, aganta same kiel aliaj vivantaj organismoj, kaj defendanta sin sprite kaj genie kontraŭ ĉio, kion ĝi konsideras fremda kaj danĝera al si, procedante kiel la naturo mem.

La supersignita ŭ.

Fine, krom **ĉ**, **ĝ**, **h**, **ĵ** kaj **ŝ** ekzistas en Esperanto ankoraŭ unu supersignita litero, kiu obeas nek la leĝojn, kiuj validas por **ĉ**, **ĝ**, **h**, **ĵ** kaj **ŝ**, nek la leĝojn validantajn por la esperantaj **a**, **e**, **i**, **o**, **u**. Tiu ĉi litero, trovante sin meze de ambaŭ, alprenas jen ion de tiuj ĉi, jen ion de la aliaj. Ĝi estas la supersignita **ŭ**.

Estas menciinde, ke ĝi ne staras en la lingvo izole, sed ke ĝi posedas sian sensupersignan samkarakteron kunulon **j** (kiu estas legata kiel **j** de lFA; kiel **y** de la franca kaj angla lingvoj [**yes**, **boy**]), kaj kiel **j** de la germana). Gramatikoj intermiksas la terminojn kaj kunligas ofte ambaŭ sub unu komuna nomo, titolante **ŭ** kaj **j** jen duonkonsonantoj, jen duonvokaloj, laŭ personaj kaj individuaj plaĉoj de la aŭtoroj, cetere sen troa domaĝo, ĉar la kategorioj estas neniel solidaj tie ĉi. Generale la supersignita **ŭ** estas duonvokalo (pro sia aspekta kaj sona simileco al la vokalo **u**) kaj **j** estas duonkonsonanto (pro la sama kaŭzo — la simileco al la konsonanto **j**). **U** estas duonvokalo ĉiam kaj ĉie, konkorde kun **u**, kiu estas ĉiam kaj ĉie nur vokalo. **J** estas jen duonkonsonanto, jen konsonanto. De la konsonanta **j** ĝi ne estas distingata per supersigno kiel **ŭ**, sed en ambaŭ roloj (ĉu la duonkonsonanta, ĉu la konsonanta) ĝi aperas ĉiam nur sub unu sama kaj senŝanĝa formo **j**. Ĝia agado en la lingvo ne estas tiel grava kiel tiu de **ŭ**, kaj ĝia intermikso povas kaŭzi nenian miskomprenon, kiel ekz. la ŝanĝon de silabonombro (**praŭlo** — trisilaba; **traŭmo** — dusilaba; kvankam ankaŭ seslitera kaj preskaŭ samlitera) k. s. Sekve de tio la lingvo ne bezonas aldonadi al ĝi grafikan signon distingon. La duonvokaleco de **ŭ** estas konkreta — praktika, la duonkonsonanteco de **j** estas abstrakta — teoria. La diferenco inter **u** kaj **ŭ** estas frapa, unuamomente videbla kaj aŭdebla eĉ al homo nestudinta. La diferencan inter **i** duonkonsonanta kaj **j** konsonanta rimarkas nur tiu, kiu jam almenaŭ iom aŭdis pri la gramatiko. En la silabonombro ambaŭ, **j** kaj **ŭ**, ne estas kalkulataj kiel vokaloj, sed kiel konsonantoj.

Ŭ estas elparolata kiel la duobla **w** de Internacia Fonetika Asocio kaj de la angla lingvo; kiel **ou** de la francaj **ouate**, **oui**; aŭ kiel **u** (**au**) de la germana lingvo.

Ne estante vokalo sed duonvokalo, ĝi neniam povas stari izole en la lingvo, sed ĉiam nur ligite kun alia vokalo, kiel ekz. **a**, **e** aŭ **o**, kun kiuj ĝi formas la respektivajn diftongojn **aŭ**, **eŭ** aŭ **oŭ**.

Kaŭze de la ĵus dirita **ŭ** do kutime ne povas aperadi en la komenco de vortoj. Escepton faras la anglodevena neologisma kaj neoficiala **ŭato** (en kiu **ŭ** aperas anstataŭ **v**, por diferencigi la vorton **ŭato** de la jam ekzistanta kaj alisignifa **vato**), kaj la neoficiala, neologisma **ŭesto**

(okcidento), enkondukita en la lingvon de la modernaj aŭtoroj.

En tiu ĉi rolo ŭ iĝas kvazaŭ samvalora egalaĵo de la anglaj duoblaj **w**, troviĝantaj en la komenco de la anglaj **w**-vortoj, kaj estas prononcata same (kiel unusilaba **au** aŭ **ue**, sone proksimiĝanta al **va** aŭ **ve**).

Sufiĉe ofte aperas ŭ en la fino de vortoj kiel ekz. prepozicioj: **antaŭ**, **ĉirkaŭ**, **kontraŭ**; en la fino de adverboj: **morgaŭ**, **hieraŭ**, **hodiaŭ**; kaj en la fino de kelkaj aliaj, kiel: **aŭ**, **naŭ**, **miaŭ**, **gaŭ** k. s.

Estas atentinde, ke la supersigno super **ŭ**, ne ludante tiun saman rolon, kiun ludas la supersigno super **ĉ**, **ŝ**, **ĝ** ktp., distingiĝas de tiuj ĉi ankaŭ laŭforme, por ke neniu miskompreno okazu; kaj por ke neniu povu direkti kontraŭ la supersigna sistemo de Esperanto riproĉojn, eble pravigitajn, pri ĝia mallogikeco kaj neprecizeco.

Konservantoj de la unueco.

Resume ni do povas konstati, ke Esperanto laŭsone ne estas malpli riĉa ol la aliaj lingvoj vivantaj. Male, ĝi eĉ posedas kelkajn sonojn, kiuj en aliaj lingvoj mankas.

Tiel ĝi havas ekz. **ĝ**, kiu svarmas en la angla lingvo kaj en slavaj idiomoj, sed tute forestas en la germana; posedas **ĥ**, kiu konas la slavaj lingvoj, sed kiu estas fremda al la angla kaj la franca; **ĵ**, kiu same kiel **ĝ** forestas en la germana; kaj **r**, kiu mankas en la ĉina.

Sed ĝi ne havas la nazajn **an**, **in**, **un**, **on** kaj la fermitan **u** (**ŭ**) de la franca lingvo; ne posedas la diversajn specojn de fermitaj kaj malfermitaj **a**, **e**, **o**; la multnombrajn diftongemajn glitvokalojn de la angla lingvo; nek la slavajn molajn **ĉ**, **ĝ**, **ĵ** kaj **ĵ**.

Tamen la foresto de tiuj ĉi sonoj, cetere ne internaciaj, ne estas malprofito por la lingvo, ĉar plej multaj nacioj, krom kelkaj, al kiuj la ĵus nomitaj sonoj estas propraj, ne nur ne konas ilin, sed ilia elparolo eĉ estas por ili malfacila, ofte preskaŭ neebla. Plue, la troa multeco de sonoj ne kontribuas al la lingvo novaĵn esprimeblecojn, kiel eble kredas kelkiuj okazaj observantoj, sed male povus eĉ iĝi komenco de la malsimpliĝo kaj neordo. Cetere Esperanto kun siaj dudekok sonoj tute ne apartenas al lingvoj laŭsone malriĉaj, kaj eĉ inter la riĉaj ĝi ne okupas la lastan lokon.

Konsonantoj la plej oftaj en ĝi estas **l**, **k** kaj **t**, simile kiel en la japana lingvo. Sed **s**, tre ofta en okcidenteŭropaj lingvoj, aperas en ĝi ne tiom ofte. Ankaŭ vokaloj estas en Esperanto uzataj modeste, kiel ekz. en la itala lingvo.

Tio, la fakto, ke ĝiaj vortoj ofte finiĝas per vokalo neakcentata, grandparte romana karaktero de ĝia vortaro kaj ankoraŭ kelkaj aliaj ecoj malpli ĉefaj similigas Esperanton al la plej sudaj latinidaj lingvoj la itala, provenĉala kaj hispana, al kiuj ĝi estas ofte kalkulata, se temas pri la aligo al iu el la tri ĉefaj eŭropaj lingvofamilioj, kvankam tiu klasigo ne estas ĉiam ĝusta, forgesante multajn ĝermanajn kaj slavajn elementojn, kiuj kunfluis por kunkrei ĝin; kaj preterlasante ĝian internan karakteron, la kvazaŭ-animon, kiu estas ne nur nelatinida, neĝermana kaj neslava, sed eĉ neeŭropa, parenca al Azio kaj ĝiaj grandaj nacioj, kiuj, se ili jam ne povis kontribui al ĝia ekstera flanko (la vortaro k. a.), des pli ekskluzive kontribuis al ĝia flanko interna, la pli grava kaj la pli ĉefa. Tiel, se la eksteraĵo de Esperanto apartenas al Okcidento, ĝia interno kaj kerno estas la plej intima propraĵo kaj havaĵo de Oriento. Kaj tion oni ofte emas forgesadi.

Do, post la komparo de la esperanta alfabeto kun aliaj alfabetoj ĉu internaciaj, ĉu naciaj, oni konstatas, ke la esperanta alfabeto posedas certajn avantaĝojn konsiderindajn. Precipe ĝia sistemo supersigna estas mirinda kaj ĝis nun ne sufiĉe taksita. Ĝi ebligas al Esperanto la esprimon de preskaŭ ĉiuj ekzistantaj sonoj per kelkaj literoj, komunaj al ĉiuj lingvoj kaj popoloj. Kaj ĝi garantias konstantan kontinuecon inter la grafia kaj prononca flankoj de la alfabeto, kiujn ĝi kontrolas kaj igas ĉiam identaj. Kontraste al ekzemple la angla lingvo, en kiu la

kontinueco inter la grafia kaj sona flankoj de la lingvo tute perdiĝis. La grafia flanko ŝtoniĝis. Ĝi retenis tiun aspekton, kiun ĝi posedis en la XVI-a jarcento. Dume la prononco evoluis senhalte kaj senripoze. La abismo inter ambaŭ — la grafio kaj la prononco — grandiĝis, kaj nun eĉ la Angloj mem ne scias plu, kie kaj kiel la skismo likvidiĝos.

En Esperanto kontraŭe skismo neniam povos okazi. Ĝiaj supersignoj gardos ĝin kontraŭ ĝi. Ili alrapidus ĉiam, kiam la lingvo volos forlasi la katenon de sia sensupersigna literaro; kaj tiam ili sin mole metas sur ĝian malmolan, grekolatinan marmorecon kiel elastaj sunradioj sur malnovajn kolonojn, abakojn, kapitulojn kaj tegmentojn, donante al ĝi nekutimajn kaj belajn nuancojn kaj kolorojn.

Ili mole sonos en ĝi...

Kaj ilia harmonio akorde kaj harmonie harmonios kun la ceteraj mil mirindaj harmonioj de la Lingvo Universala...

*

Eble vi scias tion, eble vi forgesis, ke

la unua pioniro de Esperanto en nia lando estis socialisto (Fr. Vl. Lorenz),

la unuan lernolibron de Esperanto por Ĉeĥoj verkis Fr. Vl. Lorenz kaj eldonis ĝin je propra risko en Pardubice (1890). La libreto havis 27 paĝojn, 19×12 cm,

en jaro 1902 komencis juna moravia instruisto Th. R. Ĉejka eldonadi 3 gazetojn: Revuo Internacia, Bohema Esperantisto kaj Germana Esperantisto,

inter la eksterlandaj kunlaborantoj de Bohema Esperantisto (Ĉeský esperantista) estis 8 Rusoj,

konata progresema ĵurnalista Karel Pelant (1874—1925) estis kunfondinto de nia unua Esperantista Klubo (en Brno 1901),

unua prezidanto de Esperantista Klubo en Praha (1902) estis librovendisto Ed. Weinfurter

unua slovaklingva libro pri Esperanto estis slovakia traduko de »Fundamento de Esperanto«, kiun verkis kaj eldonis D-ro Albert Škarvan en kunlaboro kun malnova rusa esperantisto Nikolao P. Evstifejev (1907),

unua libro de tradukoj el ĉeĥa literaturo estas »Rakontoj« de J. Arbes. Tradukis ilin kun permeso de la aŭtoro J. Grňa (1908),

unua ĉeĥa revuo kun resumo en Esperanto estis »Zámyšľelidské«, kiun eldonadis kaj redaktis prof. d-ro A. Batěk (1874—1944),

unuj ĉeĥaj esperantistinoj en Praha kunvenadis en Náprstek-Muzeo (U Halánků),

legejo de la iama kafejo »Union« en Praha havis en jaro 1909 30 gazetojn en Esperanto,

unua Esperanta gazeto por demandoj pedagogiaj kaj instruistaj estis »Internacia Pedagogia Revuo«, kies redaktoro estis Th. R. Ĉejka,

en la revuo »Esperanto« (1909) skribis pri ni rusa esperantisto d-ro Ilja Ostrovskij jene: »Aŭstrio-Hungario, kiu konsistas el tiom da diverslingvaj popoloj, ĝis nun ne prezentis kontentigajn sukcesojn de nia movado. Sole Bohemoj jam de longe laboras por nia afero. Inter ili estas kelkaj tre agemaj kaj senlacaĵ samideanoj jam de unuaj jaroj, kiuj serioze kaj sindoneme laboras«,

»Unua virina grupo esperantista« en Praha (1904) estis sisteme la sola societo de esperantistinoj,

instruado de Esperanto estis enkondukita en Klár-Instituton por Blinduloj en Praha (1904) kaj la unuan kurson gvidis blinda komponisto K. E. Macan, kiu verkis ankaŭ lernolibron kaj vortarojn por blinduloj en Braillea skribo,

en Internacia ekspozicio de gazetoj, aranĝita de neesperantista »Klubo de gazetoj kompostitoj« en Brno (1904), inter gazetoj el preskaŭ ĉiuj landoj estis ankaŭ 18 gazetoj en Esperanto,

iamu librovendejo de firma Topič en Praha eldonadis ampleksajn katalogojn de Esperanto-literaturo,

dum la IV-a Universala Kongreso Esperantista en Dresden (1908) okazis kunsido de slavaj esperantistoj, kiun partoprenis 1 Bulgaro, 7 Rusoj, 16 Poloj kaj 32 Ĉeĥoj,

en Köln a. R. (Germanlando) fondiĝis en j. 1909 »Bohema Esperantista Rondeto-Comenius«, al kiu tuj aliĝis 13 Ĉeĥoj,

»Studenta Rondeto Esperantista« en Praha dissendis antaŭ fino de lerneja jaro (1909) cirkulerojn al ĉiuj mezaj lernejoj en Bohemio, atentigante tiamaniere siajn kolegojn pri Esperanto,

»Bohema Asocio Esperantista« sendis (1911) po ekzemplero de »Úplná učebnice esperanta« de Ĉeĥa kaj Krumpholtz al 150 mezaj kaj fakaj lernejoj kun la peto, ke ĝi estu¹ envicigita en studenta biblioteko. 138 lernejoj akceptis la libron, 12 resendis ĝin,

unia oficiale aprobita societo esperantista post la unua mondmilito en nia respubliko estis »Rondeto de esperantistinoj« en Praha (1919),

unia Esperanta gazeto de ĉeĥaj laboristoj estis »La Kulturo«, kiu aperis 1912—1914 en Praha,

unia Esperanto monumento en la mondo estis la monumento en Františkovy Lázně, inaŭgurita en jaro 1914,

kancelario de Ŝtata loterio por subteni la vidvinojn de poŝtofiscistoj en jaro 1910 en Praha korespondis en Esperanto kaj inter ok diverslingvaj tekstoj sur ĝiaj lotbiletoj estis unu en Esperanto,

laŭ ĝenerala dekreto de la instrumisterio komencis oficiala instruado de Esperanto en niaj lernejoj en la jaro 1921/22,

en Urba teatro de Královské Vinohrady estis en jaro 1921 prezentita »Nokto en Karlův Týn« de J. Vrchlický en traduko de M. Lukáš,

unia ekzameno ĉe Ŝtata ekzamena komisiono por urbanaj lernejoj okazis la 8. XI. 1921. Ĉiuj kvin kandidatoj estis aprobitaj,

Ĉeĥoslovaka Asocio Esperantista presigis en j. 1922 24.000 ekzemplerojn de Manifesto al instruistaro de la tuta mondo, proklamita en Internacia Pedagogia Konferenco en Genevo, kaj disvastigis ĝin inter ĉeĥoslovaka instruistaro,

unia Esperanta lernolibro por Ĉeĥoj, oficiale aprobita por uzo en urbanaj kaj mezaj lernejoj, estis »Učebnice esperanta« de J. Šupichová (1921),

dum paskaj tagoj 1927 okazis en Praha internacia konferenco »Paco per lernejo«, kie Esperanto estis uzata kiel unusola traduklingvo,

unuan internacian Libertempejon en Lázně Bělohrad en 1931 partoprenis 70 esperantistoj el 14 landoj,

en jaro 1937 pendis en 80 ĉeĥoslovakaj stacidomaj tabuloj kun indiko pri adresoj de lokaj kluboj kaj delegitoj,

en jaro 1934 publikigis 305 ĉeĥoslovakaj gazetoj 1996 artikolojn pri niaj lingvoj kaj movado.

1. III. 1951. Julie Šupichová.

El Popola Ĉinio. Výborný měsíčník čínských esperantistů. Předplatné Kčs 50,— přijímá knihkupectví Svazu.

Majerová: Urbo sub signo de fajro Kčs 32,50
Vladyka: Mi en li Kčs 52,—
Afrankite. Mendu tuj ĉe Librovendejo de EAĈSR.

Nova skribmaterialo kun Esperanto-emblemo.
Luksa karteto kun koverto 10 pecoj 16,—
Aerpoŝtaj letero kun koverto 10 pecoj 16,—
Poŝtkarto 10 pecoj 5,—

LINGVO

Překlad 30. textu.

La grandioza plano de ŝanĝo¹ de la naturo, la elkonstruo de gigantaj akvo-elektrejoj² kaj la akvumo de dezertoj kaj stepoj estas rekte³ manifesto de la mondopaco.

La sukcesoj en la konstruado⁴ de la komunismo en USSR montras, per la ekzemplo de pli alta kaj pli progresinta⁵ mastrumado kaj de pli alta kaj pli progresinta⁶ tekniko, vojon por la popoldemokratiaj⁶ landoj dum la konstruado de la socialismo en ĉi tiuj landoj, kaj ili montras al la vivantaj generacioj perspektivon de transiro al la konstruado de la socialismo. — (Klement Gottwald.)

P o z n á m k y: ¹ de transformo; plano transformi la naturon... elkonstrui... akvumi ² hidrocentraloj ³ fakte ⁴ realigado. Lukáš užívá: masonado. — Nikoli: la sukcesoj de konstrukomunismo = budovatelského komunismu, kdežto zde se říká budování komunismu ⁵ pli matura ⁶ popoldemokrataj.

Překlad zaslalo nám 53 čtenářů. Prosíme je, aby tentokrát — pro nedostatek místa — netrvali na uveřejnění svých jmen. Děkujeme jim za spolupráci a těšíme se, že i další text najde hojně překladatelů. Zvolili jsme pro změnu opět text z beletrie.

31. text k překladu.

Smrákalo se, ticho, ani zavanutí. Byl dusný, červencový podvečer. Ani lístek se nehnu na kvetoucích lipách u kostela; všude po hřbitově i dál za něj těžká jejich vůně. Pojednou v sraženém zástupu šerém jako v jedno slitém prošlehlo. Plameny zapraskaly v hranici, prolézaly jí, vyrazily z ní a šlehalý do výše. Červená zář poletovala nejostřejší po těch, kteří stáli nejbližší: bledý Koniáš, krevnatý Mateřovský i P. Firmus, jehož široká brada začala se radostným dojmem hýbat, i děkan s kaplanem a za nimi městské právo, purkmistr, syndikus, radní, mezi nimi také Mikuláš Doubrava.

Ti vzadu v zástupu se tlačili, krky natahovali, na špičky se stavěli, zvláště když od ohně se ozval misionářův hlas; to Koniáš měl krátké proslovení: až zhynou ty knihy, kořen zla, dílo ďáblovo, plné bludův a kacířství, ať se s nimi spálí hříšná láska k nim. Pokynul a student famulus podal první svazky a volal: »Knihy Václava Machovce, myslivce ze Skalky!« Kostelník je vzal a hodil nejprve starou bibli odranou, bez desek, do plamenů. Vtom kantor Vondřejc švihl pravicí nad hlavou, dupl nohou a zanotoval: »Zapalte kacířské bludy — — « Do toho hned mečivý tenor učitelského mládence i přívál svěžích hlasů dívčích a chlapeckých: »Zkazte pekelné obludy, spalte pohanské nevěry — — «

Za bibli padla do plamenů druhá, třetí kniha. Listy starých tisků žárem se prudce kroutily, čepeřily, černaly a v okrajích hned řeřavěly, hořely. — (A. Jirásek: Tmno, str. 235.)



Nokta papilio.

Flirtpapilio sur podi'
soldancas mi sub ruĝa lamp'.

Jen mia sun' kaj mia kamp'.
Flugilo mia: melodi'.

Min vane sekvus retkarcer'.
Dum flirta flug' al plena bril'
mi tuŝas ĉiun kun facil'
celante al pli alta sfer'.

Kaj tamen rompos iam sven'
la flugon supren al amant',
sed antaŭ fin' de l' dolĉa kant'
mi mortos post kurten'.

Eli Urbanová.

KRONIKO ENLANDA

Ĉeĥoslovaka kultura delegitaro al Ĉinio gvidata de universitata profesoro Dr-o Jaroslav Průšek vizitas dum sia ĉeesto en Pekingo ankaŭ Ĉinan Esperanto-Asocion. La ĉinaj esperantistoj donis al siaj gastoj inter aliaj donacetoj ankaŭ almanakon de ĉeĥoslovakaj noveloj kaj poemoj, kiuj estis tradukitaj en la ĉinan el esperantlingva libro »Ĉeĥoslovaka Antologio«. Ni tradukas tiun ĉi ĝojigan informon el ĵurnalo Lidové noviny el 24. II. 1951.

Por via sano Karlovy Vary, Ĉeĥoslovakujo, Mondbanejo de laboruloj. Jen titolo de 16-paĝa prospekto eldonita de Centra Informa Servo en Marto. Ĝi estas jam la dua esperantlingva prospekto aperinta en la nova Ĉeĥoslovakio. La bildoj estas tre trafe elektitaj, la teksto estas tre informa, ne reklama. Kvankam ne multvorta, ĝi diros al eksterlanda leganto multon pri la nuna Ĉeĥoslovakio. Ni gratulu al ĝia aŭtoro F. V. kaj ni gratulu al la direkto de la banloka entrepreno pro tiu ĉi eldono. La prospekto estas ricevebla de CIS en strato Dukelských hrdinů, Karlovy Vary.

Monata revuo por propagandi kaj protekti naturbelaĵojn de Slovakujo Krásy Slovenska, aperanta monate sur luksa papero kaj kun multaj bildoj, publikigas titolojn ĉe ĉiuj bildoj en la slovaka, rusa, angla, franca kaj Esperanta lingvoj. Tia uzo de E. certe meritas imiton kaj la redakcio de la revuo meritas gratulon pro saĝa apliko de nia lingvo. Adreso de la redakcio: Slovakotour, Turč. Sv. Martin.

Koresponda kontakto inter infanoj el Plzeň kun infanoj finnaj per Esperanto. La 6-a meza lernejo en Plzeň aranĝis helpe de la Esperantista Klubo ekspozicion de paco - aĵoj el diversaj landoj, inter ili ankaŭ el Finnlando. Redaktarino de progresema ĵurnalo Uusi Päivä en Turku sciiginte per esperanta korespondado pri tiu ekspozicio petis pionirojn de tiu lernejo sendi leterojn kaj desegnaĵojn por Infana Angulo de ŝia ĵurnalo kaj ricevinte multajn, organizis respondojn de finnaj lernejoj, reprenis en la porinfana rubriko nomojn de la korespondintoj kaj partojn el iliaj leteroj. Ĉefredaktoro de la ĵurnalo enpresis laŭdajn menciojn pri la desegnaĵoj. Ni vidis longajn artikolojn pri la Plzeňaj pioniroj en tri numeroj de Uusi Päivä el 11, 18, 20 februaro 1951. Pri la afero raportis ĉeĥa ĵurnalo Pravda en Plzeň, 13. II.

Okaze de la Internacia virin-tago la 8-a de marto sendis kunvenintaj oficistoj de la urbodomo en Plzeň, grupo de Entreprena konsilantaro de Revolucia Sindikata Movado (ROH) esperantlingvan salutleteron al Organizo de Demokratiaj Virinoj en Turku (Finnlando). Subskribitaj prez. L. Košteinová, sekr. A. Hejtmánová. La leteron tradukis s-o R. Burda.

Konferenco de la XIII-a regiono okazis en Kyjovice ve Sl. la 11-an de marto. Ĉeestis membroj el Ostrava, Opava, Háj, Bohumín, Radvanice, Třinec, Stonava, Kopřivnice, kiel gastoj S- Fran. Svačina el Lanžhot. Por Centra Komitato ĉeestis vicprezidanto Rud. Hromada el Praha. Estis diskutita la situacio de la movado en la tuta regiono, distriktaj perantoj raportis pri sia agado, Rud. Hromada skizis la aktulan situacion en la lando, precipe pri tio ke nia organizo estas akceptita en sferon de kultura agado de Revolucia Sindikata Movado (ROH). Matene estis malfermita E-ekspozicio, kiun instalis unusola esperantisto en la urbeo Ant. Luzar. Ĝi estis la unua E-ekspozicio en la distrikto, patronecon akceptis loka Kultura Komisiono. La ekspozicio konsistis el kolektoj de s-o Luzar, precipe el bildoj, kaj ĝi tre plaĉis kaj plene respondis al propagandaj bezonoj de la distrikto. Ĉe la inaŭguro parolis pri signifo de Esperanto soj Luzar, Slaný, Kubala kaj Svačina.

Konferenco de la VIII-a regiono en Hradec Králové la 17—18-an de marto. La tradicia Jozefa vespero estis denove festo ne nur de Jozefoj, sed de ĉiuj partoprenantoj, kiuj venis ankaŭ el Týniště n. Orł., Rychnov n. Kn., Letohrad, Nový Bydžov, Pardubice, Praha, Bojkovice, Lanžhot, Vysoká, Svitavy. La programo estis riĉa kaj amuza. Bonega unuaktaĵo de gesinjoroj Suchardová, arta danco de s-ino Pávková, Spejbl, Hurvínek kaj Mánička de Hrabí, unuaktaĵo de Rejthárková, Štěpánková kaj Fiedler kaj amuza prezentaĵo de s. Rýznar estis partoj de la programo. Poemojn tre bone deklamis s-inoj Suchardová kaj Matyková. Tuta programo estis bonege aranĝita kaj gvidata tre sperte de s-ano Jar. Dolanský.

En la sekvanta tago jam de la mateno flirtis sur hotelo Avion verda standardo. La kunvenon malfermis regiona peranto Fr. Pytloun. Oni rememoris per ekstaro s-anon J. Holeček el Josefov, kiu mortis pro akcidento en la pasinta jaro. S-ano Pytloun priskribis situacion en la tuta regiono, kiu pro transloĝiĝo de kelkaj bonaj perantoj ne estas tiom kontentiga, kiel ne dezirus. Esperantista klubo dissendis al ĉiuj kluboj kaj al multaj unuopuloj demandaron, por ke ni povu forigi malhelpaĵojn, pro kiuj suferas Esperantomovado en diversaj lokoj. S-ano R. Hromada klarigis situacion de nia movado en ĈSR, kaj admonis, ke ĉiu verbadu novajn kaj malnovajn esperantistojn por la Asocio. En la sekvanta diskuto partoprenis reprezentantoj el Týniště (Suchardová), Hořice (Munzar), Úpice (instr. Kopecký), Chlumec nad Cidl. (Fr. Ryba), Nový Bydžov (Kafková), Rychnov n. Kn., (Šedá) Přelouč (dr. Fousek), Bojkovice (Tichoň), Lanžhot (Svačina), Svitavy (Rýznar). El la diskutoj ni vidas, ke estas malfacila laboro varbi nun novajn adeptojn kaj aranĝi kursojn, kiam mankas vortaroj, lernolibroj kaj literaturo. — S-ano Hromada respondis ĉiujn demandojn kaj montris, kiamaniere oni povas eĉ hodiaŭ utile puŝi antaŭen nian movadon. En la fino s-ano dro Fousek prezentis poemon destinitan al E-Klubo en Hradec Králové. (Fr. P.)



Japano k-do Saka Tadashi el Tsu Mien-ken kun sia patrino ricevinte la donackeston el Plzeň.

NI LEGIS

Metiistoj, dommastrinoj, vilaĝanoj, labormastroj, butikaj kaj kontoraj komizoj, kiuj neniam aŭ apenaŭ havis konatojn kaj aferorilatojn en eksterlando ĝis sia lerno de Esperanto, studis kaj uzas la lingvon. Ni povas diri: Esperanto eniris pli hejmon ol oficejon: ĝi penetris pli en koroj ol en intelektoj. La ideo de esperantismo asociiĝis pli al pensoj pri tutmonda frateco, perletera konversacio, egaleco de ĉiuj teranoj, kongresturismo ol al konceptoj pri komerca utilo, ĵurnala informado, diplomataj servoj, scienca kunlaborado. Tre multaj esperantistoj ne estas homoj, kiuj eklernis la lingvon pro tio, ke ili jam bezonas ĝin. Ofte nur la propagando kaj la lerno de Esperanto vere konsciigis ilin pri la neceso kaj utilo de lingvo internacia. Ili mem kreis siajn internaciajn rilatojn post la eklerno. Estas Esperanto, kiu kondukis ilin al internacieco; ne internacieco, kiu kondukis ilin al Esperanto (K. Wilgenhof en *Nederlanda Esperantisto*, januaro).

Jarraporto 1950 de la Brita E-Asocio (anglalingva) prezentota al ĝia kongreso en Ipswich (11.—14. V. 1951) meritas atentan legadon. Nin aparte interesis alineoj pri propagande granda sukceso de Lapenna-prelegvojaĝo kaj pri malavareco de britaj samideanoj. Ankaŭ ekzisto de aktivaj societoj de britaj esperantistaj instruistoj kaj sciencistoj estas pruvo de aktiveco de la movado en fakaj rondoj. Enviinda estas ekzisto de propaganda anglalingva filmo »En aliaj mondoj«.

Inter vizitantoj de la klubejo de Brazila Esperanto-Ligo en Rio de Janeiro estis en unua duono de 1950 du ĉeĥoslovakaj s-oj Jindra Černík kaj Karel Melichárek. (Laŭ listo en *Brazila Esperantisto*, jul.-aŭg. 1950.)

Brazila Kroniko aperanta regule en *Brazila Esperantisto* pravas pri daŭra aktiveco de samideanoj en tiu granda lando.

Prelegoj de Prof. Dr-o Ivo Lapenna okazis dum marto 1951 en Nederlando. Ankaŭ tie estis la resonado de la prelegvojaĝo tre bona. Precipe gravaj ŝajnas al ni renkontoj de dr-o Lapenna kun diversaj eminentuloj en la koncerna lando kaj la atento, kiun li dediĉas al influo de la socia etoso al disvolvo de lingvo internacia.

Ŝaka Heroldo, internacia ŝaka bulteno por fervojo kaj poŝto, intencas aranĝi ŝakan turniron de fervojistoj la 16—22-an de majo okaze de la tria kongreso de »Internacia Federacio Fervojista« en Parizo. Li invitas al partopreno ankaŭ fervojistojn ĉeĥoslovakajn. Aliĝiloj estas riceveblaj de la redakcio (Friedrich Majer, 13b, Holzkirchen Obb., Bahnhofplatz 7, Germanio).

Inter la prozo de la esperantista gazetaro titolas rubriko en la hispana Boletín de la Hispana Esperantista Federacio, en kiu »La legema koboldo« raportas pri sciindaĵoj en nia gazetaro. En n-ro el februaro li enskribis »Voĉojn el malproksimo« tradukitajn de V. Vinař.

Okazontaj aranĝoj en 1951. Dansk Esperanto Blad el marto kompilis liston de esperantistaj aranĝoj dum 1951. Kvankam ĝi certe ne estas kompleta, enestas 39 konferencoj, kongresoj, kunvenoj, kursaroj ktp. Ankaŭ tio pravas vivantecon de nia movado. Precipe kursaroj, kies ĉefa celo estas perfektigi adeptojn de nia movado en uzado de la lingvo, efektivas unu el gravaj kondiĉoj de nia progresado: ellerni.

Prahaano George Novotný instruas en Montreal (Kanado) Esperanton en kursoj komencitaj la 22-an de septembro 1950. Li kondukas la kurson laŭ rekta metodo, por ke kaj france kaj angle parolantoj povu partopreni kune. (*Amerika Esperantisto*, dec. 1950.)

Junaĝo de kamarado Mao Cze-Tung verkita de Emi Siao, tradukita de Honfan, aperas en Popola Mondo, oficiala organo de Ŝanhaja Esperantista Societo. Enestas pluraj anekdotoj el la vivo de tiama knabo: »lutage la patro ordonis lin kolekti kune kun la juna frato fabojn falintajn sur kota kampo. La frato estis petolema, li elektis

lokon, kie maldense kreskis fabuoj, ĉar tie estis malmulte da faboj falintaj kaj pro tio oni povis facile kolekti en mallonga tempo sed en pli granda areo. Male kamarado Mao Cze-Tung elektis lokon dense surkreskatan de fabuoj kaj tie li paciencis la fabojn deŝiradis kaj kolektadis. Tio bezonis pli multe da tempo kaj la prilaborata areo ne povis esti granda. Alveninte kaj supraĵe kontrolinte la patro tuj laŭdis la fraton kaj kamaradon Mao riproĉis. Sed kiam kamarado Mao montris al li kolektitajn fabojn, la patro silentis.

El ĉi supra citita anekdoto ni povas scii, ke kamarado Mao Czetung estas praktikema en la laboro ekde sia junaĝo kaj havas karakteron de senruzeco, honesto kaj simpleco.«

La Revuo Orienta aperas jam la 31-an jaron eldonate de Japana Esperanto-Instituto en Tokio (Hongo-Motomati) en dikaj (40-gaĝaj) kajeroj aperantaj regule ĉiumonate. En jarkolektoj pasintjara kaj nunjara aperas traduko »Tiel parolis Zaratustro« de Nietzsche. La revuo enhavas multajn detalajn studojn lingvistikajn. En raporto pri la 37-a kongreso de japanaj esperantistoj la 22—23-an de julio en Jokohama ni legas, ke fakkunsido de medicinistoj prezidata de D-ro Seiiti Matumoto decidis eldonadi »Medicinan revuon« (laŭ propono de D-ro N. Toida).

Vocabulaire Elektrotechnique International (International Elektrotechnical Vocabulary), la libro de 311 paĝoj 21 X 29 cm, kies unua eldono aperis en 1938 kaj estis tuj elĉerpita, aperis en fino 1950 represita per fotografa procedo. Ĝi estas kolektiva verko de Internacia Elektroteknika Komisiono (IEC). Adreso de la eldoninto Commission Elektrotechnique Internationale, 39, route Malagnou, Genève. La libro enhavas kompletajn difinojn en la franca kaj en la angla lingvoj de ĉ. 2000 terminoj ofte uzataj en elektrotekniko, klasigitajn laŭ racia sistemo. Apud la difinitaj terminoj troviĝas iliaj tradukoj en germana, itala, hispana, kaj Esperanta lingvoj. Ĝi estas unua fojo, ke Esperanto estis enmetita en ampleksan terminaron tre oficialan. En la IEC partoprenas ĉiuj gravaj ŝtatoj, inter ili ankaŭ Sovetio. La vortaro krom tio ĉi eldono aperis ankaŭ kun aliaj tradukoj (rusa, portugala) en apartaj libroj. Estas planata nove redaktita eldono kaj oni studas novan liston de uzataj lingvoj. Pri enmeto de Esperanto por la unua eldono ne konsentis ĉiuj naciaj Elektroteknikaj societoj, do estos bezone denove klopodi, ke Esperanto restu en la nova eldono. Ke la libro estas bezona kaj uzata, tion pravas tiu ĉi nova eldono pro si mem. (Laŭ R. Watier en *Franca Esperantisto*, febr.)

Norvega Esperantista Ligo 40-jara. El fruntartikolo de ĝia nuna prezidanto multmeritata C. Støp-Bowitz en *Norvega Esperantisto* (jan. 1951) ni enskribu tie ĉi nomojn de la unuaj pioniroj norvegaj: Haldor Midthus, kiu, unue studinte volapükon, eklernis Esperanton en 1900. En 1910 studento S. Engesgaard Christie iniciatis fondon de landa asocio. Ĝi naskiĝis la 27-an de jan. 1911 kaj ekhavis nomon *Norvega Esperantista Ligo* kaj havis komence 60 membrojn. Pri la dua mondmilito ni legas: »Venis la dua mondkatastrofo en 1939—1945. Certe ankaŭ tiu ĉi mondmilito signifis gravan baton por la Esperanto-movado, sed la N E L estis nun sufiĉe forte por kontraŭstari la baton. Tuj oni ĉesigis ĉian publikan agadon, tiel ke la germanaj okupantoj ne trovis nin sufiĉe signifaj por meriti malpermeson. Anstataŭe oni koncentrigis la fortojn ĉirkaŭ du celoj: lingva perfektigado kaj laŭebla konservado de la organizo kaj membraro. Tiu programo montriĝis efika. Je la militfino la lingva nivelo de la restantaj membroj estis pli alta ol iam antaŭe kaj la organiza aparato restis nedifektita, ne malpleje pro la verko kaj daŭra sindona laborado de Arnfinn Jenson.« Nun en la jubilea jaro N E L havas ne malpli ol 3 eksterlandajn geinstruistojn: s-ino Madeleine Haudebine, redaktoro Tiberiu Morariu kaj D-ro A. Mildwurf. En la nuna momento NEL havas 20 klubojn.

Oomoto, monata organo de Oomotanoj, membroj de la Universala Homama Asocio, komencis denove aperadi. En decembro 1935 komencis persekutado de tiu ĉi religia mondreforma movado, la fondinto Onisabro Deguĉi, lia edzino kaj ĉirkaŭ kvindek eminentuloj de la movado estis arestitaj. Nur en 1945 ili estis ellasitaj el maliberejoj. Onisabro Deĝuĉi, »antaŭ ol li ĉieliris la 18-an de januaro 1948« klarigis la aferon per sekvantaj vortoj:

»En la afero kulpaj estis nek mi nek policanoj nek la registaro. Tiutempe Japanujo estis tiel abnorma, ke la registaro ne nur ne permesis eĉ unu japanon ne kunlabori por la militismo, sed perforte altrudis la militismon al ĉiuj japanoj senescepte. Sub tiaj cirkonstancoj religiaj movadoj ankaŭ ne povis esti esceptoj. Sed Oomoto havas la mision por la rekonstruado de la mondo per la eterna paco kaj por tio devas okupiĝi en la konvertado de la homaj koroj ĝis la lasta. La vera religia movado ne devas esti tia, kia trumpetas pacon en la tempo de paco kaj tamen tamburigas por la milito, kiam milito venas. Dio evidente entreprenas la reformadon de la mondo pere de Oomoto kiel la »granda fundamento« de Lia plano. Pro tio Dio kondukis nin en malliberejon — kiu estis la sola loko, en kiu ni, plukonstruantoj de la universala mondopaco, estis permesataj resti almenaŭ sen kunlaboro por la milito. Dio starigis alibion. Ĉio, kio okazis, estas laŭ la Providenco.«

Ni represas tiun ĉi klarigon kiel dokumenton. Ni ja ĉiuj scias, ke la mondopaco estas akirebla ekskluzive per komuna laborado de ĉiuj laboruloj gvidataj de Sovetto, kiu organizas tiun batalon por paco laŭ tutmonda skalo.

En buŝo estu vero, paco en koro! Tiel insiste vokante al porpaca laboro titolas artikolo de nia membro Valda Vinaŝ en Oomoto el decembro 1950.

El jarraporto 1950 de Svisa Esperanto-Societo en Svisa Espero (jan.-feb.) ni represas alineon pri Interhelpa servo: la agado de tiu servo ree malpliĝis, ĉar la situacio rilate nutraĵojn estis en multaj landoj pli bona ol en antaŭaj jaroj. Tio kaj multaj enlandaj kolektoj malagrable influis la donemon de niaj subtenantoj. La kaso restis malgrasa kaj la agadpovo malgranda almenaŭ rilate nutraĵsendaĵojn. Ni koncentriĝis al malsanaj samideanoj kaj estas ĝojo por ni, ke eblis helpi al kelkaj forte suferantaj amikoj en eksterlando per sendado de urĝe bezonitaj medikamentoj, nericeveblaj en la koncernaj landoj. La helpo al malsanaj kunhomoj en la verda rondo restu nia plej alta idealo. — El alineo pri prelegvojaĝo de egipta Megali ni sciigas, ke li estis en Svislando la 2. XI. —8. I., estis dufoje intervjuita en Radio kaj prelegis en Zürich, Morges, Vevey, Bern, Basel, paroladojn aŭdis sume 350 personoj.

Norvegaj samideanoj sendigas sian organon Norvega Esperantisto al pluraj siaj korespondantoj en nia lando. En n-ro el jan. 1951 ni legas detalan leteron de nia membro Frant. Luňáček sub titolo »Agrabla novjarsaluto«, en n-ro februara en rubriko »El nia poŝto« dankajn konfirmojn de Julie Šupichová kaj de Sláva Pytloun.

Mortis René Ferdinand, franca esperantisto, lerninta Esperanton en 1944, tre aktiva laboranto inter laboristaj esperantistoj kaj delegito por sindikataj aferoj de UEA. Por li Esperanto estis antaŭ ĉio ilo. Fervora sindikatista batalanto (li estis ano de la estraro de la urbooficistoj en la Confederation Generale du Travail) li opiniis, ke la plej bona maniero uzi nian lingvon estas meti ĝin je la servo de la laboristaro, de la sindikatismo. Li mortis la 13-an de decembro 1950, nur 37-jara. (La Esperantista laboristo, jan.-feb. 1951.)

Profesoro Giorgio Canuto, prezidanto de Itala E-Federacio, estis elektita rektoro de universitato en Parma. Li estas profesoro de tribunal-medicino.

Gepatra faksekcio ĉe la Germana Esperanto-Asocio daŭre funkcias. Ĝia ciklostilita bulteno estas ĉiam instiga kaj enhavas multajn sciigojn pri infanoj edukataj

dulingve. En ĝia 18-a n-ro el marto 1951 ni legas, ke ankaŭ Asocio de Esperantistoj en Pollando alpaŝas al organizo de sia infana sekcio, kaj petas pri alsendo de sciigoj pri spertoj akiritaj de germanaj samideanoj.

Internacia Esperanto-Muzeo en Wien (I. Hofburg) eldonas depost oktobro 1950 ciklostilitan bultenon kvaronjaran. En la unua numero oni asertas, ke en 1927 Edmond Privat atingis en Budapeŝto, Praha kaj Wien de tiamaj instrumentistoj konsenton al »sia propono, ke 5 ŝtatoj prove enkonduku Esperanton devigfakte en siajn lernejojn«. Ni tiam tre intense kunlaboris pri ideo de »interŝtata Akordo«. Tial ni povas aŭtoritate konstati, ke en neniu el tiuj landoj simila konsento estis donita. Al ni tre malplaĉas diri asertojn, kiuj erarigas nuntempajn esperantistojn. (Kamarŝt.)

Nekontentiga stato de nia propagando estas konstatebla laŭ Prof. D-ro Ivo Lapenna (en »Esperanto« el feb. 1951) ankaŭ el la fakto, ke al demandaro de UEA-propaganda fakto sendita al 38 landaj Asocioj kaj fakaj organizaĵoj kunlaborantaj respondis sume sole 8 naciaj Asocioj (norvega, ĉeĥoslovaka, franca, germana, brita, itala, kroata, nederlanda LEEN), el la fakaj Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj kaj Internacia Ligo por Esperanto en P. T. T. Temis pri demandoj pri faktoj el propaganda aktiveco dum la lasta kvaronjaro. Laŭ la aŭtoro la farita enketo montras ke »nia tuta aktiveco sur la propaganda kampo estas ankoraŭ tre neorganizita. La progresado de nia afero estas grandparte rezulto de nia propra agemo, dum la stagno aŭ eĉ malprogresado estas grandparte kaŭzita de nia propra neagemo«. Tamen multon ankaŭ influas la ĝenerala politika kaj ekonomia situacio; kiam atento de la publiko estas streĉita al tute klaraj celoj aliaj, nia agado povas havi resonon sole nerespondan al la streĉitaj klopodoj.

UNESKO konfirmis la valoron de Esperanto per letero sendita al s-ro E. D. Durrant, UEA-komisiito por Unesko-aferoj. La letero tekstas: »Kara Sinjoro, Dankon pro via letero de 31-a de julio 1950 kaj n-roj 534/5/6/7 de »Esperanto« enhavantaj tradukon en Esperanto de serio de artikoloj de R. Calder pri »Homoj kontraŭ dezerto«. — Ni estas tre dankaj al vi, ke vi tiel atentigis la Esperantistajn legantojn pri ĉi tiu projekto efektivegita de la Nacia Komisiono de Britujo por Unesko. — Mi esperas, ke vi ricevis informon pri la vizito de grupo de viaj kongresanoj en Unesko-domo, kiu, mia opinio, estis sukceso. Via impona kongreso en Parizo donis al ni okazon konstati, kiom valoraj aliancanoj viaj membroj estas en la movado por internacia interkomprenado kaj en la tasko konstrui remparojn de paco en la spirito de la homoj. — Sincere via Vladimír Herčík, Ĉefo, Rilatoj kun neregistaraj organizaĵoj.« (»Esperanto«, febr. 1951.)

Grafika terminaro kompare al terminaro en la angla, franca, germana, itala kaj nederlanda lingvoj de Rud. Hostettler aperas po unu paĝo en kajeroj de Informilo de I. G. E. L. (Inter. Grafika Esperantista Ligo) operanta ciklostilite en Ulvsunda, Poŝtkesto 12, Svedujo. La terminaro estas verkita tre zorge. Sed pri iuj terminoj mi tamen dubas. Ekz. diri »lino« por lin-tolo uzata por librobando ŝajnas al mi nekomprenebla por multaj. Mallongiga germana parolturno »in Leinen gebunden« eĉ se ĝi estas uzata ankaŭ en la nederlanda, ne estos komprenata sen plua klarigo de francoj kaj angloj; ĉu ne estus pli komprenebla tolo kaj tolbando, oni ja ofte legas tole bindita.

Grava konsultverko listigas Esperanton, Reference Catalogue of Current Literature (Konsulta Katalogo de Aktuala Literatura) en eldono por 1951 enlistigas 53 verkojn eldonitajn de The Esperanto-Publishing Company Ltd., Rickmansworth. (»Esperanto«, febr. 1951.)

La Milionoj volas la Pacon titolas frunt-artikolo de T. J. en Heroldo de E. el 16. XII. 1950.

Pri Varsovia packongreso raportas Heroldo de E. la 16-an de decembro 1950.

LOKAJ INFORMOJ

Bratislava. — Kunvenoj ĉiumerkrede je la 20. h. en YMCA, str. Malinovského, blua saloneto.

Ĉeská Skalice. — La 15-an de januaro aranĝis E. K. Hradec Králové prelegon de Jar. Dolanský. Provelcionan prezentis Fr. Pytloun. Kurson por 18. p. gvidas Fr. Pytloun.

Hradec Králové. — Programo de paroladoj en merkredaj kunvenoj klubaj: 4. IV. Fr. Pytloun: El Kanariaj Insuloj, lando de kontrastoj. 11. IV. Z. Matyková: Rememoro je la verkisto Čečetka. 18. IV. J. Hlaváček: La fervojo en la lastaj jarcentoj. 25. IV. Fr. Tuch: Vagado sur la firmamento. 2. V. L. Rejthárková: Gajaj kriminalaĵoj. 5. V. Vondráček: Pri marionetoj. 16. V. V. J. Hrabí: Špejbl, Hurvínek kaj Mánička fariĝis esperantistoj. 23. V. M. Otčenášková: Ĉapitro el nederlanda libro »La perfido«. 20. V. V. J. Matějka: Rememoroj el la milito 1866. 6. V. J. Hlaváček: Plua evoluo de la fervojoj. 13. VI. D. Motlová: Historio de la ĉeĥa muziko. 20. VI. Fr. Pytloun: Viva gazeto, novaĵoj el la E-mondo. Z. Matyková: Rememoro de Jirásek pri Hradec Králové. 27. VI. E. Pávková: El la vivo de la fama dancisto Nižinskij. J. Dolanský: Valoro de la prelegoj okazintaj en merkredaj kunvenoj dum la jaro. — Novaj kursoj komenciĝis la 18-an de januaro, la elementan gvidas J. Hlaváček, la progresintan J. Dolanský, en la klubejo. — La 19-an de januaro okazis prelego de Jar. Dolanský en lernejo por metilernantoj per lerneja disaŭdigilo, ĉar ne estis eble 400 lernantojn lokigi en unu ĉambro. Post la prelego tre laŭdita de instruistoj prezentis Fr. Pytloun provlecionon al 70 aŭskultantoj.

Košice. — Kunvenoj ĉiumerkrede je la 19,30 h. en la Lernista lernejo (str. Modlitebná 1).

Lipt. Sv. Mikuláš. — Kunvenoj ĉiumerkrede je la 19-a h. en la klubejo de Slovakotour.

Pardubice. — Esperantista klubo »Dro Schulhof« rememoras nunjare laborjubileon de sia prezidanto R ŭ ž a V e v e r k o v á. Ŝi esperantistiĝis en la jaro 1921 okaze de XIII-a Universala Esperanto-kongreso en Praha. Ekde tiu tempo ŝi laboris en la klubo entuziasme en diversaj funkcioj. Pro sia senlaca laboro kaj meritoj ŝi estiĝis prezidantino de la klubo, gvidante ĝin en maltrankvilaj jaroj de germana okupacio ĝis nuntempe. Kun amo ŝi helpis al ĉiuj en - kaj eksterlandaj esperantistoj dum sia longjara funkciado kiel delegito de UEA en Pardubice, estante konstanta kunlaborantino de ĉefdelegito O. Sklenčka en Hradec Králové. Prezidantino Veverková vizitis kelkajn internaciajn kaj landajn kongresojn, uzante ĉiam nian helplingvon praktike. Do, 30 jarojn la jubileantino dediĉis al oferema paclaboro, al nia kara lingvo. Akceptu ŝi dankojn kaj samtempe deziron, ke ŝi restu ankoraŭ longe inter ni sana kaj feliĉa!

Pardubice. — En la jarkunveno de la E. K. Dro Schulhof la 2-an de marto estis elektitaj: honora prezidantino R ŭ ž e n a V e v e r k o v á, prezidantino Ludmila Zapletalová, vicprez. Frant. Nálevka, sekretario Karel Franc (Okrouhlik 811), kasistino Marie Udržalová.

Plzeň. — Kulturklubo de ROH (Revolucia Sindikata Movado) ĉe Unucea Nacia Komitato decidis krei inter siaj membroj esperantistan sekcion. Invitilojn al aliĝo dissendis la klubo al siaj membroj per 800 cirkuleroj. La E-kursoj okazos en la urbooficejoj antaŭ aŭ post la labortempo, por ke la partopreno en la kurso ne rabu tro da tempo.

Praha. — Programoj de la E-Klubo: 27. 12.: filmvespero (projekciis Slanina). — 3. 1.: Pri lakto ĝenerale kaj speciale (bulgara gasto IngC. Kostadin Ĉičanov). — 10. 1.: Kalocsay kaj Privat pri eblecoj de lingva evoluo en Esperanto (Mařík). — 17. 1.: Ĉeĥoj en eksterlando (rememoroj de Vítek). — 24. 1.: Pri malnova historio de Esperanto (Hromada). — 31. 1.: Ŝparekonomio — serĉkolektado de krudaĵoj (Echtner). — 7. 2.: Pri Laponoj laŭ mia sperto. Lumbildoj (Vítek). — Lastajn tradukpoemojn de R. Hromada deklamis Suchardová el Týniště n. O. — 14. 2.:

Homa sobredo sub lumo de statistiko (J. Bendová). Sanigo per sugestio (Ginzová). — 21. 2.: Nova vivo en Germana Demokrata Respubliko Impresoj el mia vojaĝo en aŭtuno 1950 (Adamek el la Junularo). — Pri kamentubisto-poligloto, kiu parolis eĉ perse kaj cigane. (Nekrologo de Ŝustr pri s-ano J. Ježek - Erinazzo el Buštěhrad.) — 28. 2.: K. Marx kaj artefaritaj lingvoj (Hromada laŭ gazeto »La Rondo« el Melbourne). — 7. 3.: Pri unu subtilaĵo de la Esp. gramatiko. — Nova, skota skolo de Esperanta poezio. Deklamo kaj komento (d-ro Pumpr). — 14. 3.: Aventuroj de miaj korespondantoj el Burmo kaj de sub Kilimandjaro (Ŝustr). (Ijm)

VALNĀ SCHŪZE SVAZU

koná se v neděli 17. června 1951 o 8. hod. v rest. Šumava, Praha II, Štěpánská ul. s obvyklým programem dle stanov. Podrobnosti v příštím čísle. O opatření nocehu přihlaste se včas písemně v kanc. Svazu.

ESPERANTISTA VIVO

Mortis Jindřich Ježek — Erinazzo, majstro kamentubisto en Buštěhrad, la 21-an de februaro, nur 52-jara, naskiĝinta en Lišov la 12-an de julio 1898. Forpasis viro neordinara. Lia profesio ne malebligis al li funde studi fremdajn lingvojn kaj li fariĝis poligloto de nekutima eruditico. Krom la ĉefaj eŭropaj lingvoj li sciis ankaŭ la araban, persan, hebrean, ciganan. Krome li funde studis ankaŭ problemojn de la ĉeĥa lingvo; kiam li prezentis siatempo funde argumentitan proponon pri reformo de ĉeĥa ortografio subskribitan per siaj nomo kaj profesio, la komitato specialista deklaris, ke temas pri kaŝnomo de fama profesoro. La metilernadon li finis en Plzeň dum la unua mondmilito. Tie li fariĝis esperantisto kaj veninte en 1920 en Prahan li mirigis ĉiujn samideanojn per flua konversacio kaj riĉega vortrezoro.

Li multon verkis en Esperanto. Ekzistas kompleta lia traduko de »Kantoj de Sklavo« de Svatopluk Čech, el kiu multaj pecoj estis publikigitaj en La Progreso. Ankaŭ lirikisto li estis. Ni esprimu tie ĉi profundan kondolencan al lia edzino kaj du filoj kaj lasu paroli la poeton en versoj verkitaĵ »je la tria matene la 19. 12. 1948«:

Mia skribmaŝino.

Mia fidela kamaradino,
mia malnova skribmaŝino,
kiom jam vin mi turmentis,
kun vi kompaton ne sentis!

Kion vi ĉian jam skribis,
kion mi al vi konfidis:
konton komercan, lernejan taskon,
ŝuldo-admonon malpaciencon,
taman leteron, studon sciencon,
gajan novjaron, ĝojan kristnaskon,
nomtag-gratulon, tradukon, poemon,
(kiam mi havis tempon kaj emon) ...

Ĉu vi ankoraŭ la sanon konservas?
Kaj kiom jarojn al mi vi servos?
Kaj kia estos via sorto
post mia morto?

Kiu vin poste posedos?
Ĉu vi lin tedos,
aŭ li vin,
post mia fin'?

Erinazzo.

Mortis Karel Modličovský, supera kalkula sekretario de KNV, nia membro en Kostelec n. Orli., la 16-an de marto 1951, nur 45 jara. La edzino kaj du infanoj akceptu niajn sincerajn kondolencojn.

Mortis Josef Karel Štreiberg, membro de E. K. en Hradec Králové, post longa suferado la 9-an de marto. La familio akceptu nian sinceran kondolencan.

Edziĝo. Milena Bartošová kaj Jiří Pytloun la 28. III. 1951 en Praha. Sinceran gratulon!

RICEVITAJ LIBROJ

Naŭlingva Etimologia Leksikono. Louis Bastien. 1950. The Esperanto Publishing Company Ltd. Anglujo. 320+XVII paĝoj 12×18 cm. Bindita. Prezo 12 ŝ. 6 p. — La unua eldono de tiu ĉi grava verko aperis en 1907. Dua eldono estas pli ampleksa, ĉar la nombro de oficialaj radikoj de nia lingvo proksimume duobliĝis. Celo de la verko estas montri devenon de la esperanta vortaro kaj pruvi ĝian internaciecon, plifaciligi memoriĝon pri radikoj al tiuj, kiuj iom konas aliajn lingvojn, vekti la intereson de la leganto montrante rilatojn inter vortoj de Esperanto kaj de lia propra lingvo. Tio estas atingata per tabeloj de oficialaj vortoj kun respektivaj vortoj en la latina, franca, itala, hispana, portugala, germana, angla, rusa, se tiuj ĉi vortoj iel similas al la vorto esperanta. Ne ĉiam temas pri vorto precize samsignifa. Estas elektita tiu vorto, kiu similas la vorton esperantan, eĉ se ĝia signifo estas iel derivita aŭ iel parenca kun la vorto esperanta. Ekz. al »arbo« estas citita angla »arbour« kiu signifas arbetejo, al »herbo« estas citita germana »Herbarium« kaj rusa »gerbarij«, kiuj signifas herbokolekton k. t. p. La studado de la tabeloj estas tre instrua kaj utila. La rusaj vortoj estas skribitaj per esperantaj literoj, iam fonetike. Tre profitas sciinto de la rusa lingvo, se li atente esploras la rusan liston. Li konvinkiĝos, kiom ŝuldas la Esperanta vortprovizo ankaŭ al la rusa lingvo. Temas precipe pri apliko de la 15-a paragrafo de la Fundamenta gramatiko pri la »fremdaj vortoj«. Zamenhof studis ja en ruslingvaj lernejoj, kaj lia elekto de la »fremdaj« vortoj estis farata laŭ ilia aplikado en la rusa lingvo.

Paul Benneman: Miru, pensu, ridu. La libro de la bona humoro. 1950. Heraldo de Esperanto. 240 paĝoj 15×21 cm. — Malofte mi legis libron, kiu donis al mi tiom da plezuro. Estas tie kolektitaj kuriozaj informoj el la mond-historio, el la geografio, biologio, tekniko, matematiko, anekdotoj, ŝercoj. Oni ofte trovas tiaspecan legaĵon en diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj kiel distran kompletigon de la programoj. Sed neniam mi ankoraŭ vidis kolekton de tia materialo elektitan tiel saĝe kaj sperte. Sed pli grave: Rakontitan tiel agrable, koncize kaj tamen tuj kompreneble. La aŭtoro majstre ŝparas la vortojn, lia prezento de la temoj estas klara kaj daŭre katenas intereson de leganto. Sed plue: la lingvaĵo de la aŭtoro estas simpla, tre agrable legebla, kvankam temoj, pri kiuj oni parolas, estas tre diversaj kaj tre diferencantaj reciproke. Li prezentas la faktojn kaj la rezonadojn koncize sed klare. Eĉ se temas pri detalaj informoj aŭ pri silogismaj konkludoj. Kaj en la fono vi ĉiam sentas rakontanton, kiu bonvole aŭ malice ridetas. La aŭtoro ŝajnas esti specialisto en ĉiuj fakoj. Tamen li permeso al mi konjekton, ke li estas matematikisto. Tial li verkis ankaŭ sian vortaron tiel bone. Estis uzitaj sur dense presitaj 240 paĝoj abundaj fakaj terminoj kaj la leganto neniel suspektas, ke li trapasas kurson de faka lingvaĵo.

Pri neniu el la uzitaj »fakaj terminoj« mi dubas, escepte du: Pri rezulto de multipliko oni devus ĉiam diri »produĉto« ne produkto kaj »mal-multiplikon« oni devus ĉiam nomi »divido« ne »divizio«. Tio estas versimile malatento de la klera aŭtoro. Ĉar ĉie en lia libro oni trovas abundon de profunda scio lingva kaj sennombrajn pruvojn de lia arto rakonta. Ankaŭ tipografia aranĝo de la libro estas tre bona. Ni gratulu al la eldoninto pro la tre bona elekto kaj eldono.

Jarlibro de la UEA. 1951. Unua parto. La enhavo de tiu ĉi Jarlibro ne povas esti represata, ĉu tute, ĉu parte, sen la permeso de U. E. A. Copyright by Universala Esperanto-Asocio, Heronsgate, Rickmansworth, Anglujo. Nur por uzo de membroj. UEA, Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) Anglujo. 256 paĝoj 11×15 cm. — La konata jarlibro aperis jam en fino de januaro, kio certe helpas al pli intensa uzado. Krom la Adresaro de la delegitoj (1014),

vicdelegitoj (185) kaj fakaj delegitoj (1985) kaj kutimaj listoj estas nove enmetitaj Aranĝoj esperantistaj en 1951, Internacia Somera Universitato-regulato, Gazetara Servo, Korespondara Servo. Inter Gazetara Esperantista ankaŭ tiun ĉi jaron mankas »Esperanto-Servo«, gazeto kiu superas ĉiujn ceterajn esperantlingvajn gazetojn per amplekso de la presata materialo kaj tre versimile ankaŭ pro eldon-nombro. La jarlibro estas tre plaĉa eldonaĵo, tre bele presita kaj jam pro tio ĝi instigas al serĉado. Sciigoj en ĝi estas fidindaj kaj tre sciindaj.

Marista Terminaro. Komandanto Peter Clissold. 1950. Universala Esperanto-Asocio. Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo. 64 paĝoj 12×15 cm. Prezo 1 ŝ. 6 p. aŭ 5 respondkuponoj frankite. — La terminaro aperis en du partoj en UEA-jarlibroj 1949 kaj 1950. Nun ĝi aperas en tre bele presita broŝuro. La terminoj estas esperantlingve difinitaj, ordigitaj laŭ temoj. La difinoj estas klaraj, ofte enestas bildoj por helpi precizigi la difinojn. Tre utila aldono estas alfabeto listo de terminoj kun tradukoj en la angla, franca, germana, hispana. UEA meritas pluan dankon pro tiu ĉi plua eldono de faka terminaro. La ne-multaj linioj tie ĉi diritaj ne povas redoni gravecon de tia verko. Ni klopodos post nelonge aperigi artikolon detale informantan pri fakaj terminaroj.

Por iu pli bona mondo. Kolekto de dokumentoj dediĉita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko al la XXII-a Internacia Kongreso de Katolikaj Esperantistoj okazinta en Romo dum la Sankata Jaro 1950-a. 32 paĝoj 24×31 cm. — Lukse presita grandformata broŝuro kun gravaj dokumentoj pri Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko, ĝiaj rezolucioj kaj faroj pruvantaj ĝian pozitivan sintenon al Esperanto.

Urbo Belo Horizonte titolanta libreto de 36 paĝoj (21×21 cm) sur tre bela papero enhavanta bildojn el tiu ĉi ĉefurbo de la brazila ŝtato Minas-Gerais, posedanta tiun ĉi nomon ekde la jaro 1890. La loko, kie tiu ĉi nova ĉefurbo situas, komencis esti loĝata en 1701, por ĉefurbo ĝi estis elektita en 1893. Nun ĝi havas ĉirkaŭ 350 mil loĝantojn. Pri tio raportas tre interesa »Sinteza historio de Belo-Horizonte«, tri-paĝa, verkita de Abilio Barreto. La libro estas eldonita de Brazila Instituto de Geografio kaj Statistiko kaj estas ricevebla ĉe Brazila Esperanto-Ligo, Praça da República, 54—1º, Rio de Janeiro por 5 respondkuponoj.

Evropský tlumočník 21 řečí. Příručka pro mezinárodní styk, sestavená za spolupráce 20 jazykových odborníků. V roce 1950 vydalo nakladatelství Práce. Cena 45 Kčs. Stran 265.— Hle, těmito jazyky hovoří ke čtenáři náš tlumočník: anglicky, bulharsky, dánsky, finsky, francouzsky, holandsky, italsky, maďarsky, německy, norský, polsky, portugalsky, rumunsky, rusky, ukrajinsky, srbochorvatsky, španělsky, švédsky, řecky a turecky. Podle předmluvy si toto dílo vytkló za cíl sloužit účastníkům mezinárodních sjezdů a rekreantům, ale i stručnému styku obchodnímu a cestovnímu; nahrazuje dvacet konverzačních slovníčků najednou a chce přispět k povzbuzení zájmu o studium cizích jazyků. Nejprve se uvádí 110 vět a výrazů, jimž se má ten, kdo chce Tlumočníka používat, naučit nazpaměť. Pak následuje 255 vybraných slov v pořadí podle české abecedy. Každý výraz je očíslován, aby bylo možno snadno jej nalézt ve všech uvedených jazycích. Je to pomůcka zajímavá svou methodou a jistě může někdy usnadnit trapnou situaci člověku, který se octl v jazykové cizím prostředí. Ale řešení jazykového problému to není, ba ani náběh a ukazatel takového řešení. I když sestavím — po dlouhém námaze a gramatických i slovníkových rozpacích — větu, jejíž smysl cizinec uhadne, jak mám potom já porozumět jeho vysvětlování, na něž se tážím? Zde nechává Evropský tlumočník své zájemce na holičkách. — My esperantisté se domníváme, že známe cestu, jež vede z Babylonu jazyků, a nabízíme světu řešení, jež bylo praxí vyzkoušeno a osvědčilo se. (Pu.)

České listy o esperantu

Dopis holandské matky:

Ještě jsou v živé paměti slavné dny I. čs. sjezdu obránců míru v Praze, ještě zní strhující slovo ministra dr. J. Plojghara, odhalujícího v zásadním referátě imperialistické úklady podněcovatelů nových válek a burčujícího k aktivnímu boji za vítězství míru. K mohutnému, silnému a dnes už organizovanému světovému hnutí obránců míru hlásí se s nadšením i pracující v kapitalistických státech. Na důkaz toho uvedl ministr dr. J. Plojghar krásný příklad z II. Světového kongresu obránců míru ve Varšavě. Tam vystoupila v diskusi holandská žena-matka, která prohlásila: »Mluvíím za sta holandských matek; nedávno byl můj syn odsouzen na sedm let těžkého žaláře za to, že odepřel dát se nalodit pro boj v koloniích a že odhodil pušku.« A holandská matka dodala: »Pochopíte, že jako žena a matka trpím tím, že mé dítě je zbaveno na sedm let svobody, ale jako žena a matka jsem hrda na to, že mám takové dítě.«

Tato holandská matka, delegátka varšavského kongresu, sledovala pozorně i průběh prvního sjezdu čs. obránců míru; svědčí o tom dopis, který poslala v těchto dnech ministru dr. J. Plojgharovi. Píše:

Excellence! Podepsaní, matka a otec Petra Staverena, z plna srdce Vám děkují za Vaše laskavá slova, týkající se našeho syna, za slova, pronesená u příležitosti Vašeho mírového kongresu ve dnech 20. až 21. ledna 1951.

Také my, moje manželka a já, zůstaneme pracovníky pro mír, stejně jako Vy a Váš lid.

At žije mír! — Haag 23. ledna 1951. — A. v. Staveren, Zusterstraat 35, Den Haag.

Tuto zprávu z Lidové demokracie z 1. II. 1951 zde otiskujeme také proto, že uveřejněný dopis i korespondence o něm byly psány esperantem.

Povídka nikoli nejmenší. Když jsem přede dvěma lety četl v Lidovkách povídku Jiřího Marka Hovová matka, byl jsem dojat, ale též rozhořčen, že se ještě dnes vůbec mohou vyskytnout lidé, kteří mluví o válce, jedni lhostejně, druhí záměrně. Řekl jsem si: tuto povídku musí číst celý svět, a proto jsem se rozhodl přeložit ji do esperanta. A tak v květnu 1949 vyšla v našem mezinárodním časopise Esperanto-Servo i s kresbami Mrkvíčkovými. Ohlas ve světě byl ohromující. Markova povídka se četla v Australii, v Jižní i Severní Americe, v Indii, v Číně, v Japonsku a ovšem ve všech evropských státech. Četla se v esperantských klubech a byla pak z esperanta přeložena do několika jazyků a otištěna v denním tisku. — Však to také byla opravdová práce pro mír a obžaloba všech válečných paličů. — My, českoslovenští esperantisté, jsme vděční Jiřímu Markovi za tuto povídku, která postavila náš lid ve všech dílech světa do prvních řad bojovníků za mír. Výtisky Esperanto-Servo z té doby jsou zcela rozebrány a stále nám docházejí dopisy z ciziny, v nichž se esperantisté, bojovníci za mír, dožadují této povídky. Proto ji otiskneme znovu a rozešleme do všech dílů světa, aby dále burcovala k boji za mír, který zvítězí, protože pravda je na straně obránců míru. — Adolf Malik, předseda Svazu esperantistů ČSR. — (Lidové noviny 30. I. 1951.)

Projev solidarity. Plzeňská odbočka Svazu esperantistů za plné pomoci četných místních organizací KSC v Plzni uspořádala rozsáhlou sbírku na pomoc a podporu uvězněných bojovníků za mír v Japonsku. Z výtěžku sbírky bylo upraveno celkem 50 bedniček s bohatým obsahem nej-různějších druhů potravin, jako na př. uzenin, tuku, cukru, mouky a podobně. Tyto bedničky, určené 25 japonským soudruhům, bojujícím za mír, budou v nejbližších dnech zaslány. R. Burda, dopisovatel RP (Rudé právo, Plzeň, 23. XI. 1950).

Na valné hromadě Esperantského spolku v Olomouci bylo vzpomenuo památky otce náměstka předsedy vlády Zdeňka Fierlingera, zemřelého prof. Eugena Fierlingera,

který v r. 1909 vedl v Olomouci první kurs esperanta. Shromáždění se rozhodlo zvolit ho, vzhledem k jeho mimořádným zásluhám o počátky esperantského hnutí, čestným předsedou spolku in memoriam. — (Nová politika, Olomouc 3. III. 1951.)

Usnesení Klubu esperantistů v Praze. Členové Klubu esperantistů v Praze, shromáždění na své slavnostní výroční schůzi, přijali jednomyslně usnesení, kterým se staví nekompromisně a bezvýhradně do řad bojovníků za udržení míru ve světě v duchu Stockholmské mírové výzvy a v soulase s usnesením Varšavského sjezdu obránců míru. - ke — (Lidová demokracie, Praha 6. IV. 1951.)

KORESPONDI DEZIRAS

Adolf Brázda, **Nové Město na Mor., ČSR**, petas pri alsendo de poŝtmarkoj el via lando. Li sendos kvanton samvaloran de poŝtmarkoj ĉeĥoslovakaj. Korespondi li ne intencas, la propono el nia 3-a numero estas nuligata.

S-ino Waltrand Semschova, **Pihel 187 (distr. Nový Bor) ČSR**, 25-jara, deziras korespondi kaj interŝanĝi pm kaj p-kartojn kun la tuta mondo.

NOVAJOJ EN NIA LIBROVENDEJO

Ivan Sarafov: Legolibro 231 pĉ Kčs 65,—
Elin Pelin: Elektitaj Rakontoj 96 pĉ Kčs 20,—
Elin Pelin: La familio Gerak 83 pĉ Kčs 14,—
Svetoslav Minkov: La alia Ameriko 111 pĉ Kčs 18,—
Hristo Smirnenski: Tra la ventego 79 pĉ Kčs 24,—
Ivan Vazov: Vagabondoj 111 pĉ Kčs 35,—
La komunista manifesto 48 pĉ Kčs 26,—
Glumarkoj: Esperanto, reĉ zítřka 100 pecoj Kčs 36,—
Esperanto-flago 33×22 cm kun oraj franĝoj .. Kčs 72,—
Esperanto-flago 22×14 cm Kčs 36,—
La prezoi enhavas afrankon. Plej simpla mendo per pagilo de »Svaz esperantistů ČSR, Praha«, konto-no 12371.

III. LETNÍ KURSY ESPRANTA V ROŽNOVĚ p. Radh.

budou letos od 14. do 28 července:

1. Kurs pro začátečníky.
2. Kurs pokračovací a konverzační.
3. Supera kurso por kursgvidantoj.

Přihlášky přijímá a informace podává:

Vladimír Slaný, Kutuzovova 29., Ostrava-Vítkovice.

SOMERA KOLEGIO DE ESPERANTO EN DOKSY

(Letní kolej esperanta v Doksech)

28. VII.—11. VIII. 1951.

Letní kolej esperanta v Doksech u Máchova jezera uspořádá — pod záštitou místní Osvětové besedy a za spolupráce Stálého přípravného výboru — ve dnech 28. července až 11. srpna t. r. tyto kursy esperanta: základní (Cseh-methodou), pokračovací, konverzační, řečnicko-tlumočnický, cvičný pro učitele Csehmet. a seminář esperantských výkladů o gramatických problémech esperanta, jeho literatuře a hnutí. — Vyučování vhodně doplní řada společenských podniků, esp. literární soutěž »IV. Květinové hry — Floraj ludoj« a j. — Počet účastníků je omezen! — Kolej koná se letos již po šesté. Kvalifikovaní učitelé, 800 dosavadních žáků, přátelské esp. prostředí a okolní přírodní krásy jsou jejím nejlepším doporučením. — Další informace žádejte se známkou na odpověď

u IKE v Doksech u Máchova jezera č. 453.

Ellerni 15-16

Přečtěme si ukázky z Bourletova referátu o druhém sjezdu a ze Zamenhofovy řeči tehdy přednesené. Radostný úžas z možnosti prvního sjezdu a z osobního styku se Zamenhofem byl už překonán. Proto tyto ukázky přesvědčují o tehdejší způsobu myšlení věrohodněji.

La dua universala kongreso de Esperanto.

Tiu aventuro-komenciĝas kiel la antikvaj fabeloj.

Estis iam iu maljunulo kaj deko da junuloj. La maljunulo nomiĝis Ernesto Naville, la junuloj: Edmond Privat, Hodler, Renard k. c.

La maljunulo estis naŭdeklarja; la junuloj — apenaŭ dudeklaraj. Kaj ili tre entuziasmiĝis por io stranga, por freneza utopio, por ia lingva miksaĵo, kies nomo estas »Esperanto«.

Ili loĝis en Genevo, kaj iliaj samurbanaj opiniis ilin frenezataj kaj tuŝetis al si la frunton per la montra fingro, kiam ili parolis pri ili. Iun tagon oni eksciis, ke okazos en franca urbo nomita »Boulogne sur Mer« kongreso de tiuj frenezuloj, kiuj sin nomas Esperantistoj. Kaj Edmondo Privat prenis sian bastonon, sian valizon kaj ankaŭ sian kuraĝon kaj veturis al Boulogne. Tie meze de granda amaso da similuloj li parolis. Kaj, kiam ĉe la finiĝo de tiu neordinara kongreso, oni diskutis pri la loko, kie la sekvantaj jaron la Esperantistaj frenezuloj denove kunvenos, sentime Privat proponis Genevon kaj per sia konvinkiga elokventeco ricevis unuaniman aprobon.

Ili do estis deko en Genevo: Deko, kiu kuraĝis elporti la mokojn, kontraŭbatali la superstiĉojn, venki la naturan homan inercion. Pene dum unu jaro ili povis aligi al la afero dudekon da novaj adeptoj kaj kun ili organizi la kongreson.

Kaj la kongreso estis granda sukceso, vera triumfo!

Kaj Genevo la bela, Genevo la fama, dum tuta semajno eĥis la kantojn kaj parolojn de l'Esperanto-amantoj.

Kaj la Genevanoj ŝancelitaj, mirigitaj de tiu nova miraklo, devas nun konfesi ĝian senduban realecon.

Dankon do al tiu kuraĝa deko; dankon al la novaj adeptoj, kiujn ili aliris; dankon ankaŭ al tiu ĉarma urbo Genevo, kiu nesingardeme lasis al si inokuli la malsanon Esperantan!

*

Ĉe balkono de la plej bela hotelo de Genevo Hôtel de l'Écu (hotelo de l'Ŝildo), la vento balancas grandan verdan standardon. Tie loĝas nia kara Majstro Zamenhof kun la eminentularo, kiu estas por li kvazaŭa korpgardistaro. De tie la mardon 28 de Aŭgusto vespere li forveturas al la Victoria Hall, kie kun korbato kaj nerveksciteco li atendas tri mil personoj.

La aspekto de l'halo estas imponanta. En la grandega belega orbrila halo sidas sur parteroj mil kongresanoj. Supre sur la balkonoj kaj galerioj pli ol du mil Genevanoj scivole allogitaj de tiu neordinara spektaklo superplenigas la ĉambregon.

Ĉe l'sono de granda orgeno, en religia mallaŭto de l'ĉeestantaro, eniras Zamenhof sekvata de l'kongresa prezidantaro kaj naciaj delegitoj.

Emociiga momento!

Ĉiuj leviĝas; kaj, dum la kara genia elpensinto de la lingvo, pala pro kortuŝeco, antaŭeniras sur la scenejo, tondra aplaŭdado eksplodas. La viroj alten svingas la ĉapelojn, la virinoj supren levas siajn gantitajn interbotantajn manojn; kaj el ĉiuj brustoj eliras unu sola unuanima krio: »Vivu, vivu Zamenhof!«

Ŝajnas, ke vento de entuziasmeĝo nepriskribbla blovas super la kapoj; ŝajnas, ke la lumigiloj pli forte brilas; kaj supre la Genevanoj, nenion sciante pri nia lingvo, neniam aŭdinte eĉ unu vorton de ĝi, tamen ekkaptitaj de tiu sinrudanta emocio, aplaŭdas kvazaŭ veraj esperantistoj.

Tiu komunikiĝo de entuziasmo estis tiel forta, tiel stranga, ke profesoro de psikologio ĉe la Geneva universitato, ĉeestinte ĉe tiu unua kunsido, kaj ne povante al si klarigi, kiel kaj kial lingvo, simpla lingvo povas naski tian uraganon de komunikiĝema eksciteco, petis de s-o rektoro Boirac, ke li verku por psikologia gazeto specialan artikolon klarigantan, kial lingvo povas tiel entuziasmigi homojn ĝis frenezeco.

Nia profesoro de Psikologio legu la supre presitan parolon de D-ro Zamenhof, kaj tiam li komprenos!

Carlo Bourlet en La Revuo, Volumo I-a, oktobro 1906.

El Parolado de D-ro Zamenhof en la Dua Kongreso.

Ĉe la malfermo de nia kongreso vi atendas de mi ion oficialan, ion indiferektan, palan kaj senenhavan, kiel estas ordinare la oficialaj paroloj. Tiam parolon mi tamen ne povas doni al vi. Mi ĝenerale ne amas tiajn parolojn, sed precipe nun, en la nuna jaro, tia senkolora oficiala parolo estas granda peko de mia flanko. Mi venas al vi el lando, kie nun multaj milionoj da homoj malfacile batalas pro libereco, pro la plej elementa homa libereco, pro la rajtoj de homo. Pri tio ĉi mi tamen ne parolos al vi; ĉar se kiel privata homo ĉiu el vi eble sekvas kun intereso la malfacilan bataladon en la granda multmiliono lando, tamen kiel esperantistojn tiu ĉi batalado ne povas vin tuŝi kaj nia kongreso havas nenion komunan kun aferoj politikaj. Sed krom la batalado pure politika en la dirita lando estas nun farata io, kio nin kiel esperantistojn ne povas ne tuŝi: ni vidas en tiu lando kruelan bataladon inter la gentoj. Tie ne homo de unu lando pro politikaj patrolandaj interesoj atakas homojn de alia lando, — tie la naturaj filoj de sama lando ĵetas sin kiel kruelaj bestoj kontraŭ la tiel same naturaj filoj de tiu sama lando nur tial, ĉar ili apartenas al alia gento. Ĉiutage estingiĝas tie multe da homaj vivoj per batalado politika, sed multe pli da homaj vivoj estingiĝas tie ĉiutage pro batalado intergenta. Terura estas la stato de aferoj en la multlingva Kaŭkazo, terura estas la stato en la Okcidenta Rusujo. Malbenita, milfoje malbenita estu la intergenta malamolo!

Kiam mi estis ankoraŭ infano, mi en la urbo Bjelostok rigardadis kun miro la reciprokan fremdecon, kiu dividas inter si la naturajn filojn de sama lando kaj sama urbo. Kaj mi revis tiam, ke pasos certa nombro da jaroj, kaj ĉio ŝanĝiĝos kaj pliboniĝos. Kaj pasis efektive certa nombro da jaroj, kaj anstataŭ miaj belaj sonĝoj mi ekvidis teruran efektivaĵon: en la stratoj de mia malfeliĉa urbo de naskiĝo sovaĝaj homoj kun hakiloj kaj feraj stangoj sin ĵetis kiel plej kruelaj bestoj kontraŭ trankvilaj laĝantoj, kies tuta kulpo konsistis nur en tio, ke ili parolis alian lingvon kaj havis alian gentan religion ol tiuj ĉi sovaĝuloj. Pro tio oni frakasadis la kranojn kaj elpikis la okulojn al viroj kaj virinoj, kadukaj maljunuloj kaj senhelpaj infanoj! Mi ne volas rakonti al vi la terurajn detalojn de la Bjelostoka buĉado; al vi, kiel al esperantistoj, mi volas nur diri, ke terure altaj kaj dikaj estas ankoraŭ la interpopolaj muroj, kontraŭ kiuj ni batalas.

Oni scias, ke ne la rusa gento estas kulpa en la besta buĉado en Bjelostok kaj multaj aliaj urboj, ĉar la rusa gento neniam estis kruela kaj sangavida; oni scias, ke ne la Tataroj kaj Armenoj estas kulpa en la konstanta buĉado en Kaŭkazo, ĉar ambaŭ gentoj estas gentoj

trankvilaj, ne deziras altrudi al iu sian regadon kaj la sola, kion ili deziras, estas nur, ke oni lasu ilin trankvile vivi. Oni scias nun tute klare, ke kulpa estas aro da abomenindaj krimuloj, kiuj per diversaj plej ruzaj kaj plej malnoblaj rimedoj, per amase dissemataj mensogoj kaj kalumnioj arte kreas teruran malamon inter unuj gentoj kaj aliaj. Sed ĉu la plej grandaj mensogoj kaj kalumnioj povus doni tiajn terurajn fruktojn, se la gentoj sin reciproke bone konus, se inter ili ne starus altaj kaj dikaj muroj, kiuj malpermesas al ili libere komunikiĝadi inter si kaj vidi, ke la membroj de aliaj gentoj estas tute samaj homoj kiel la membroj de nia gento, ke ilia literaturo ne predikas iajn terurajn krimojn, sed havas tiun saman etikon kaj tiujn samajn idealojn kiel nia? Rompu, rompu la murojn inter la popoloj, donu al ili eblon libere konatiĝi sur neŭtrala fundamento, kaj nur tiam povos malaperi tiaj bestaĵoj, kiujn ni nun vidas en diversaj lokoj.

Ni ne estas tiel naivaj, kiel pensas pri ni kelkaj personoj: ni ne kredas, ke neŭtrala fundamento faros el la homoj anĝelojn; ni scias tre bone, ke la homoj malbonaj ankaŭ poste restas malbonaj; sed ni kredas, ke komunikiĝado kaj konatiĝado sur neŭtrala fundamento forigos almenaŭ la grandan amason de tiuj bestaĵoj kaj krimoj, kiuj estas kaŭzataj ne de malbona volo, sed simple de reciproka sinnekonado kaj de devigata sinlitrudado.

Nun, kiam en diversaj lokoj de la mondo la batalado inter la gentoj fariĝis tiel kruela, ni, Esperantistoj, devas labori pli energie ol iam. Sed por ke nia laborado estu fruktoporta, ni devas antaŭ ĉio bone klarigi al ni la internan ideon de la esperantismo. Ni ĉiuj senkonscie ofte aludadis tiun ĉi ideon en niaj paroloj kaj verkoj, sed ni neniam parolis pri ĝi pli klare. Estas jam tempo, ke ni parolu pli klare kaj precize.

*

Dua Universala Kongreso de Esperanto, pri kiu ni represas raporton verkitan en la »Kroniko« de »La Revuo« de Carlo Bourlet, okazis en Genevo la 28. VIII. — 2. IX. 1906, kun 818 partoprenantoj el 30 landoj. Kiel rezultoj de la dua kongreso estas deklarataj jenaj decidoj: Starigo de Konstanta Kongresa Komitato. Rezolucio pri neŭtraleco. Deklaro pri starigo de »konsuloj« el kiuj fariĝis UEA-delegitoj. Fakaj kunsidoj okazintaj unuan fojon. Fando de Internacia Scienca Asocio Esperantista. Pri interna ideo ni publikigis apartan artikolon.

Portreto de Carlo Bourlet (1866—1913).

Bourlet estis tute alia figuro: tiel svelta kaj vizaĝmaldika kiel Boirac estis korpe kaj kape kompakta, li unuavide frapis per la brilo de viglega inteligento. Sur la kampo de la scienco li devis verki aŭtoritatajn librojn pri matematiko, mekaniko ktp, kaj krome fari plurajn teknikajn inventojn, kia la bicikla retopedalo, komerce ekspluatita de granda franca komerca firmo. Sur la kampo de Esperanto, li ne nur rapide ekposedis la lingvon kun egala korekteco kiel Beaufront kaj kun pli da vivosento ol li, sed li baldaŭ konsciis, ke la sorto de Esperanto kuŝas en la literaturo — kaj li ne havis ripozon, ĝis li trovis la rimedon por ebligi al Zamenhof konstantan tradukadon de klasikaj verkoj. Tia nekomuna valoro estis reliefigita de senlaca agopovo kaj de perfekta labortekniko: bolanta je aktiveco, kapabla dikti al pluraj tajpistinoj, memoradi plej etajn detalojn, improvizi brilajn parolojn kaj celtaŭgajn agoplanejn, tiu pintabarba, pipamanta framasono estis ankaŭ simpla en sociaj rilatoj, ĉiam bonhumora, bonkora, preta al ĉiuj kaj al ĉiuj helpema. En la kongresoj lia klarega kaj varma elokvento, lerte apogita laŭokaze de eleganta gesto aŭ neatendita spritaĵo, akiris al li

entuziasmon de la aŭdantaro. Cetere li bone konsciis sian valoron, tiris el ĝi orgojlon, kompleze flegadis sian »mi«, kaj rapide senpacientiĝis, se li renkontis kontraŭulon, kiu rifuzis lasi sin persvadi de liaj rezonoj. Sian ordonemon, facilan ekkoleremon li tute ne provis maski; kaj farinte al si opinion pri unu homo, li ĝin ne plu ŝanĝis, kaj traktis la malamikon kun ĝentila, tranĉa senkompato. Sed lia sincereco, efikanteco kaj absoluta senruzeco kompensis ĉion.

Gaston Waringhien en Leteroj de Zamenhof,
1-a vol., 1948.

*

Tolstoj kaj Esperanto. (E. Privat: Vivo de Zamenhof. 1920.)

Pro sia timemo delikata Zamenhof ne kuraĝis trudi sin al Tolstoj. Nur inter ceteraj li sendis al li la libreton en 1888. Respondo ne venis. La semo tamen estis ĵetita. Post ses jaroj ĝi leviĝis antaŭ la publiko. La popola rusa eldonejo »Posrednik« interesiĝis pri Esperanto, kaj petis opinion de la fama pensulo. »Ricevinte antaŭ ses jaroj esperantan gramatikon, vortaron kaj artikolojn skribitajn en tiu ĉi lingvo,« respondis Tolstoj, »mi post ne pli ol du horoj povis jam, se ne skribi, almenaŭ libere legi en tiu lingvo... Mi vidis multfoje, kiel homoj rilatis malamike nur dank' al materiala malhelpo je reciproka komprenado. La lernado de Esperanto kaj ĝia disvastigo estas do sendube kristana afero, kiu helpas al kreo de la Regno de Dio, kio estas la ĉefa kaj sola celo de la homa vivo« (Jasnaja Poljana, 27 aprilo 1894).

Tia parolo estis granda kuraĝigo. La letero enpresigis en »La Esperantisto« kaj varmigis entuziasmon. Ankaŭ aperis pli malfrue, en la dua numero de 1895, tradukaĵo el Tolstoj »Kredo kaj Prudento«. Pro tio la rusa cenzuro malpermesis la gazeton en la Imperio. Terura bato: ĉar tie ĝi havis la plej multajn abonantojn. La elirado devis ĉesi. Oficiala elefanto paŝpremis nur muŝeton. Sed tiel mortis la ligilo de l'esperantistoj. Malĝojo kaj mallumo regis en la rondeto. Dume Zamenhof denove baraktis kun akraĵoj de l'vivado.

Sur alia tero, feliĉe, grenero semita elkreskis. Jam en decembro saman jaron eliris »Lingvo Internacia«. Upsala Klubo Esperanta eldonis la gazeton en Svedujo. De post tiam la movado ne haltis plu.

*

Cvičení 5.

Přeložte tato hesla:

1. Se Sovětským svazem na věčné časy.
2. Nesmíme zapomenout slov Julia Fučika: Lidé bděte!
3. Uzavírejte socialistické smlouvy!
4. Rozšiřujte socialistické soutěžení!
5. Každý pracující hospodářem na svém pracovišti!
6. Sovětský svaz zajišťuje naši bezpečnost.
7. Všechny síly pro včasné provedení jarních prací!
8. Ať žije první máj, bojový svátek obránců míru!
9. Jednotná zemědělská družstva — cesta k blahobytu a štěstí pracujících rolníků.
10. Za slavný první máj, za nové úspěchy v boji za mír! Překládající, mějte na mysli, že také překlad musí znít vzhledně jako heslo. Pošlete nám své překlady!

Přečtěte si znovu odstavec Internacia periodo z Resumé historio na 10. straně Ellerni. Noví čtenáři mohou si objednat str. 1—12 za 10 Kčs v našem knihkupectví.